
# Iamaj tabuoj kaj sekretoj ĉirkaŭ

# Georgi Dimitrov

## Kiel la bulgaroj estis trompitaj de manipulita historiografio kaj falsaj herooj

**La vera rolo de Georgi Dimitrov en la politiko kaj ĝiaj tabuoj en la oficiala historiografio**
**Georgi Dimitrov, la stalinismo kaj la Esperanto-movado**

*Originale verkita de Andreas Künzli (Svislando)*
*okaze de la tribunala proceso ĉirkaŭ la Reichstag-incendio antaŭ 80 jaroj (en 1933)*



Georgi Dimitrov, kun Stalin kaj aliaj kamaradoj
(Reproduktion gemäss Creative Commons Licence von Vikimedia, s. die entsprechenden Quellenhinweise in Wikipedia: https://en.wikipedia.org/wiki/Georgi_Dimitrov, https://ru.wikipedia.org/wiki/Димитров,_Георгий_Михайлович)

### Enkonduko

La demando, ĉu Georgi Dimitrov (1882-1949), la iama komunisma gvidanto de Bulgario, estis interesita pri Esperanto aŭ ĉu li eĉ mem estis esperantisto, kiel ŝajne kredis ekzemple Julio Baghy, okupis plurajn generaciojn de bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj. Precipe por Asen Grigorov (1903-1985) kaj Nikola Aleksiev (1909-2002), du gvidaj bulgaraj esperantistoj, la bulgara ĉefkomunisto havis grandan simpation por Esperanto. Memorigi ĉi-rilatajn kontaktojn kaj epizodojn estis afero de personaj ĝojo, movada honoro, nacia fiero kaj patriotisma devo. En la Esperanto-revuoj *Bulgara Esperantisto* kaj *Paco* oni ĉiam volonte raportis pri la temo en konvenaj okazoj.

Kiu aŭ kio estis Georgi Dimitrov kaj kial tiu homo estas interesa kaj signifa ? Kelkaj kadraj biografiaj faktoj reliefigu la sensacian karieron de tiu elstara bulgara komunisto, kiuj enkonduku ĉi tiun kritikan studon. Georgi Dimitrov Miĥajlov (sekve: GD) naskiĝis la 30/18an de junio 1882 en iu vilaĝo apud Radomir (Pirin-Makedonio) en okcidenta Bulgario, kiel filo de simpla laboristo. Li vizitis nur la bazan lernejon kaj en 1894 komencis lerni en Sofio la metion de pres-kompostisto. Post kiam en 1902 li aliĝis al la Bulgara Laborista Socialdemokrata Partio, li fariĝis ankaŭ aktivulo de la Laborista Sindikata Unuiĝo. En 1906 li organizis laboristan strikon, kiu daŭris 35 tagojn – lia unua heroaĵo, pro kiu li estis arestita. En 1913 li estis elektita al la bulgara parlamento kaj fariĝis la plej juna deputito de la Reĝlando. Jam antaŭ kaj post la Unua Mondmilito li proponis la ideon de la Balkana Federacio. En 1923

li apartenis, kun Vasil Kolarov kaj Komintern, al la protagonistoj de la Septembra Ribelo.[1] Forlasinte Bulgarion, li instigis la konspiran agadon elde Aŭstrio, Svislando[2] kaj Germanio. Mondan famon GD akiris en 1933 okaze de la sensacia proceso lige kun la incendio de Reichstag en Lepsiko, kie li aŭdace defendis sin kaj la komunismon antaŭ la nacisocialisma justico kaj ties reprezentantoj Göring kaj Goebbels, kiuj persone elpaŝis dum tiu proceso kun la celo diskrediti la (probable senkulpajn) komunistojn. Post sia liberiĝo GD estis akceptita en Sovetunio, kie li ricevis la oficon de la ĝenerala sekretario de Komintern, kiel posteulo de Grigorij Zinov´ev kaj Nikolaj Buĥarin, kiuj gvidis tiun organizaĵon en la 20aj jaroj. Ĉi tiu centra pozicio en la internacia komunisma movado permesis al la bulgaro partopreni en la kompleksa disvolviĝo de tiu movado kaj devigis lin elteni ĉiujn politikajn kaj personajn kapricojn de la "genia" sovetia gvidanto Dĵugaŝvili-Stalin dum la 30aj jaroj. Post la 9a de septembro 1944 GD revenis en Bulgarion, kie li gvidis la politikon kiel ĉefministro. Kiel tia li enkondukis la komunisman diktaturon en Bulgarion. Krom tio, li klopodis revivigi, kun Tito, la ideon de la balkana federacio, kiu tamen fiaskis. Jam ege malsana, GD mortis la 2an de julio 1949 en apudmoskva sanatorio. Detaloj pri unuopaj epizodoj estos traktitaj sube.

## Georgi Dimitrov kaj la Esperanto-movado

Ivan Sarafov kaj Georgi Dolapĉiev, kiuj eble estis la solaj bulgaraj esperantistoj, kiuj pli malpli objektive priskribis la historion de la bulgara Esperanto-movado, karakterizis la stalinisman periodon inter 1949 kaj 1955 lakone kaj sen plia komentado kiel tempon, dum kiu la Esperanto-movado „paŭzis", ĉar la „kondiĉoj" ne estis „favoraj" por la propagando de Esperanto. Per tiaj formalaj vortoj la koncerna epoko estis metita ad acta kaj ne plu tuŝita. La gazeto *Internacia Kulturo* ĉesis aperi, ankaŭ la Esperanto-elsendoj de Radio Sofio estis interrompataj. La bulgaraj komunistoj ŝajne eĉ intencis malfondi la bulgaran Esperanto-organizon, sed tio povis esti evitita dank`al la efika kontraŭstaro flanke de gvidaj landaj esperantistoj. Kiam Stalin forpasis la 5an de marto 1953, la „periodo de la stagnado" (sic) estis konsiderata kiel eksa kaj la bulgaraj esperantistoj povis daŭrigi sian aktivecon. La sinsekva 32a landa kongreso de BEA povis esti organizita en 1956, kaj la asocia organo *Bulgara Esperantista* reaperis en presata formo en 1958.[3]

Laŭ Aleksiev, GD verŝajne informiĝis pri Esperanto en sia junaĝo tra la kanalo de la gazetoj *Rabotničeski Vestnik* (Laborista Ĵurnalo) kaj *Novo Vreme* (Nova Tempo), ĉar tiuj revuoj enhavis informojn pri diversaj Esperanto-eldonaĵoj, do libroj, lernolibroj, vortaroj ktp. Ankaŭ iuj tre proksimaj amikoj kaj aktivaj kunlaborantoj de GD (kiel Dragoj Koĝejkov, Kosta Ganev) estis esperantistoj. En 1912 en la gazeto *Rabotničeski Vestnik,* kies redaktoro de la sindikata fako GD estis, aperis informoj pri la baldaŭa landa Esperanto-kongreso kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo. En 1914 GD partoprenis internacian sindikatan konferencon en Budapeŝto, kies tagordo enhavis proponon pri la adopto de Esperanto kiel laborlingvo de la Internacia Sindikata Komitato. Aleksiev supozis, ke ankaŭ post la Unua Mondmilito GD ne povis ne esti informata pri la diversaj agadoj de bulgaraj esperantistoj, ekzemple pri la eldonado de la revuo *Balkana Liberiga Stelo* en 1920. Laŭ Aleksiev, GD alte taksis la vastan aktivecon de multaj diverslandaj esperantistoj, kiuj dum la lepsika proceso lige kun la Reichstag-incendio sendis al li kuraĝigajn leterojn, en kiuj ili esprimis sian solidarecon kun GD, kiu tie defendis sian honoron kiel komunisto. Laŭ Aleksiev, iuj leteroj eĉ atingis lin en la malliberejo. En la persona

[1] La Septembra Ribelo de 1923, kiun antaŭis armea puĉo en junio, estis emfazata de la bulgara komunisma historiografio kiel unua kontraŭfaŝisma ribelo en Eŭropo. La 14an de junio la gvidanto de la Bulgara Kamparana Unuiĝo, Aleksandro Stambolijski, estis mortigita de IMRO-partizanoj. Kvankam Stambolijski ne estis komunisto kaj la komunistoj ne partoprenis en lia registaro, la komunistoj tamen konsideris lin kaj lian partion utilaj al la afero de la socialismo. Pro tio Stambolijski fariĝis unu el la oficialaj ikonoj de la bulgara komunisma historiografio. Unu el la gvidaj figuroj de la Septembra Ribelo estis GD mem. La reĝa registaro kruele sufokis la komunisman movadon kaj malliberigis ĉirkaŭ 2500 komunistojn. Kiel cifero de la mortviktimoj sekve al la Septembra Ribelo estis indikita 20 000 homoj. Post la Septembra Ribelo en Moskvo vivis 500-600 bulgaraj politikaj elmigrintoj.

[2] GD utiligis falsitan svisan pasporton, kiu estis registrita laŭ la nomo de Dr. Rudolf Hediger kaj kiun oni trovis ĉe lia arestado en Berlino. (vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-42622980.html).

[3] Pri la historio de la planlingva kaj Esperanto-movado en Bulgario mi intencas publikigi apartan studon.

arkivo de GD estis trovitaj kelkaj el ili. Laŭ la sciigo de iu GDRa esperantisto, kiu laboris kiel bibliotekisto en Lepsiko, inter la libraro de la GD-muzeo troviĝis Esperanto-lernolibro por bulgaroj, kiu estis verkita de Asen Grigorov.

Ĉi tiu sama Asen Grigorov „havis la feliĉon esti sekretario de GD tuj post lia reveno en Bulgario", do en 1945. Kvankam lia sekretaria deĵorado daŭris nur kelkajn monatojn, li konservis pri GD „neforgeseblajn, karajn rememorojn". Grigorov rakontis kvar epizodojn lige kun GD kaj Esperanto, kiuj havas jenan esencon:

Kelkajn tagojn post lia sekretariiĝo en novembro 1945, Grigorov „petis la permeson de GD paroli dum kelkaj minutoj pri Esperanto. Li tuj donis ĝin." Li „starigis la problemon pri Esperanto sur praktika bazo." Li „ne parolis pri estontaj ebloj de la lingvo, ne teoriumis ĝenerale, ne donis perspektivojn izolatajn de la kuranta momento, sed priskribis la nunan praktikan agadon de la bulgaraj esperantistoj." En tiu interparolado kun GD Grigorov diris inter alie: „Kiel bonaj patriotoj, amantaj nian patrolandon kaj nian popolon, ni uzas Esperanton kaj ni havas bonajn rezultojn. Ni renodis multajn kontaktojn interrompatajn de la milito. Ni vastigis la reton de niaj korespondantoj internaciaj." Laŭ la memoro de Grigorov „kamarado Dimitrov aŭskultis" lin „atente (…) kaj mem komencis paroli", dirante: „Vi devas daŭrigi vian agadon. Antaŭ ĉio vi devas verki kaj eldoni broŝuron pri nova demokratia Bulgario, pri ĝia esenco, pri ĝiaj sukcesoj sur la kampo de la rekonstruado ekonomia, sociala, politika kaj kultura. Vi estas neŭtrala organizo, viaj vastaj ligoj kun alilandaj Esperanto-medioj estas valoraj, kaj vi devas ilin bone uzi. Samtempe vi devas esti atentemaj kontraŭ provoj de provoka kaj spiona karaktero." Grigorov demandis lin, ĉu li, „estante lia sekretario, rajtas daŭrigi en eksteroficaj horoj la redaktadon de *Internacia Kulturo.*" GD „substrekis sian konsenton per jesa gesto de la kapo." Fine, Grigorov demandis kamaradon GD, „ĉu li rememoras, ke en la nomo de la unua libera Esperanto-kongreso en aŭgusto 1945 ni sendis al li en Moskvo niajn salutojn kaj ke li respondis per speciala telegramo." GD ridete jesis ankaŭ ĉi tiun demandon kaj komprenigis al Grigorov, ke li memoris la saluttelegramon.

Tiu telegramo, kiu estis sendita okaze de la 28a bulgara landa Esperanto-kongreso en septembro 1945 al GD, havis jenan enhavon: „La bulgaraj esperantistoj, kunvenintaj en sia Unua libera kongreso en Sofio, sendas al Vi patrolandfrontajn batalsalutojn kaj promesas utiligi siajn vastajn internaciajn ligojn senmaskigi la malican malamikan propagandon kontraŭ nia demokrata patrolando". Subskribis prezidanto Triĉkov. La telegramo estis afable respondita kun jena teksto, subskribita de GD: „Mi dankas la salutojn de la kongreso de la bulgaraj esperantistoj. Miaflanke mi salutas vin okaze de la tutpopola festo de la libereco – la historia kaj saviga por nia patrolando Naŭa de septembro". (Teksto laŭ Dolapĉiev).

La dua interparolo de Grigorov kun GD okazis en januaro 1946. La preteksto por tiu kontakto estis ligita kun iu belga gazeto, en kiu aperis informo pri GD, la heroo de Lepsiko. La informo estis perata de la esperantisto Kunĉo Vâlev tra lia belga korespondanto, kiu sendis la informon al la belga gazeto. Ekzemplero de tiu gazeto estis ricevita de Grigorov, kiu montris ĝin al GD, kiu diris kun rideto: „Aha, Esperanto. Tio estas bona." Kaj Grigorov memoris, ke „la ekzemplero de la belga gazeto kun la ruĝe enkadrita Esperanta korespondaĵo dum multaj tagoj kuŝis sur la skribotablo de la glora gvidanto de la bulgara popolo."

La tria (tre mallonga) interparolo kun GD kaj Asen Grigorov koncernis la ricevon de papero por presi la gazeton *Internacia Kulturo.* En tiu tempo Bulgario produktis malmulte da papero, spertis seriozan paperkrizon kaj devis importi ĝin el eksterlando. Nur kun grandaj penoj la bulgaraj esperantistoj akiris la necesan paperon por kontentigi siajn eldon-bezonojn. Ĉar en marto 1946 estis tre malfacile akiri paperon kaj la burokrata vojo por ricevi la permeson bremsata, Grigorov perdis la paciencon kaj direktis sin al GD kun la demando ĉu li povas en lia „nomo postuli paperon por nia Esperanto-revuo". GD respondis „jes, vi povas". Kaj Grigorov „dankis lin kun ekspiro de faciliĝo." Ŝajnas, ke Grigorov poste „ne plu havis embarasojn ĉe la havigo de papero ."

Pro malsaniĝo, Asen Grigorov ŝanĝis sian laborlokon. Malgraŭ tio, li konservis la kontakton kun GD, kaj en 1947 okazis ankoraŭ jeno: En tiu jaro londonaj esperantistoj sendis al GD salutmesaĝon kaj menciis ankaŭ Esperanton. Kelkajn tagojn post kiam GD ricevis tiun salutmesaĝon, Grigorov estis telefone vokita de lia sekretario Cvetko Banĉev (ankaŭ esperantisto!) , kiu sciigis al Grigorov, ke GD „komisias" al li „respondi en lia nomo al la londonaj kamaradoj". Grigorov multe ĝojis pro tiu konfido kaj tuj plenumis la komision, kiun la legantoj de *Internacia Kulturo* povis legi en n-ro 13-14/1947.

Fine de siaj memoroj Asen Grigorov aldonis jenan avertan konkludon pri la rolo de GD por Esperanto: „Georgi Dimitrov, la gvidanto de la bulgara popolo, la legenda heroo de Leipzig, la fondinto de popola Respubliko Bulgario, ne estis esperantisto. Sed li amike rilatis al nia afero, al Esperanto kiel unu el la lingvoj, per kiu ni, kiel bonaj patriotoj kaj konsekvencaj internaciistoj, povas servi al nia socialisma patrolando.” Kaj okaze de la jubileo de GD en 1982, Grigorov skribis, ke „la bulgara popolo gloras lin kaj lian grandiozan faron. Ankaŭ ni, esperantistoj, eterne konservos en niaj koroj la memoron kaj la dankon al la granda bulgaro kaj eminenta aganto por paco, progreso kaj socialismo de la homaro.” Tiel sonis la oficiala dikcio en komunismaj tempoj.

Ĉi tiu raporto de Asen Grigorov (kies vereco ne povis estis konfirmita de tria flanko, ĉar mankas aliaj atestantoj de la interparoloj inter Grigorov kaj Dimitrov) tamen montras, ke la bulgara ĉefkomunisto sendube devis pozitive rilati al Esperanto. Do, la fakto, ke Georgi Dimitrov *ne kontraŭis* Esperanton kaj ne persekutigis la esperantistojn de Bulgario kiel la stalinistoj faris en Sovetunio, estis tre grava premiso kaj granda bonŝanco por la bulgara Esperanto-movado, kiu povis konstante referenci pri ĝi kaj kiu iusence servis kiel asekuro, ĉar en aliaj socialismaj landoj ne ekzistis tia advokateco por Esperanto (eble krom Tito en Jugoslavio). En Sovetunio, Ul´janov-Lenin rilatis indiferente, ignore kaj verŝajne ankaŭ negative pri Esperanto (ĉar li abomenis la pacifismon), lia edzino N.K. Krupskaja eĉ krude malrekomendis ĝian lernadon, kaj Dĵugaŝvili-Stalin, kiu laŭdire mem iam lernis Esperanton, persekutigis la esperantistojn, ĉar oni konsideris ilin kontraŭsovetiaj spionoj, teroristoj, trockiistoj, faŝistoj k.s. laŭ la paragrafo 58 de la punkodo.[4] Do, la bulgaraj esperantistoj, kiuj povis profiti de la reputacio esti ankaŭ batalantoj kontraŭ la faŝismo, troviĝis en multe pli favora situacio ol iliaj kolegoj en Sovetunio, Rumanio aŭ Albanio, kie Esperanto havis malfacilan ekzistadon aŭ eĉ estis (portempe) malpermesata. Nature, la samaj (ĉu politike oportunismaj, ĉu naivaj) bulgaraj esperantistoj estis nete misuzataj por la partie kaj ŝtate kontrolata komunisma propagando, kiun ili ne povis eviti, se iliaj asocioj volis esti agnoskitaj de la partio kaj do ludi iun gravan rolon en la ŝtato (finfine kiel politikaj komplicoj kaj ´utilaj idiotoj´ de la regantaj komunistoj). En tiuj cirkonstancoj certe situas parto de la tragedio de la bulgara esperantismo, ĉar post 1989 ĝi estis preskaŭ tute forbalaita samtempe kune kun la kolapsinta komunismo kaj preskaŭ tute perdis sian iaman signifon, same kiel en aliaj ekskomunismaj landoj, kie Esperanto iom prosperis (ezemple Pollando kaj Hungario).

Nature, pri GD devige aperis ankaŭ kelkaj libretoj en Esperanto. En 1962 estis eldonita en la Eldonejo por Fremdlingva Literaturo en Sofio 211-paĝa Esperanto-traduko de biografia skizo pri GD, kiu estis verkita de Stella Blagoeva.[5] En 1982 estis publikigita, ĉe Sofia Press, alia, eĉ pli mallonga biografio pri GD, kiu estis skribita de Petra Radenkova, tradukita al Esperanto de Nikola Aleksiev kaj redaktita de Asen Grigorov. Omaĝe al la 100a naskiĝtago de la fondinto de la Bulgara Popolrespubliko en la sama jaro la esperantistoj Dimitâr Papazov kaj Ĥristo Gorov eldonis en formo de malgranda festlibreto propran 108-paĝan verketon kun la titolo ‚Georgo Dimitrov: elstara Bulgara patrioto kaj internaciisto’. Ĝuste en ĝi Asen Grigorov memoris la tempon, kiam li kunlaboris kun GD kiel ties persona sekretario, kaj Nikola Aleksiev klopodis iel ordigi la faktojn por distingi la supozeblan historian veron disde la legandoj, kvankam ankaŭ Aleksiev ne povis forlasi la oficialan historiografian kadron. La artikoloj aperis en la bulgara lingvo kaj en Esperanto en diversaj publikaĵoj, kiuj estis eldonataj de Bulgara Esperanto-Asocio. Okaze de la 100-jara GD-jubileo aperis ĉe BEA ankaŭ malgranda broŝurita libreto kun la titolo ‚Georgo Dimitrov. Pri Esperanto-movado kaj pacbatalo’. Ĝin aŭtoris Nikola Aleksiev kaj redaktis Detlev Blanke (GDR). Nature, ĉiuj tiuj propagandecaj eldonaĵoj respegulis la vidpunktojn de la komunisma historiografio kial sekve ili estas nuntempe preskaŭ komplete netaŭgaj por sciencaj celoj, krom por dokumente citi kaj kritike komenti.

[4] Ĉi tiujn problemojn mi detale traktis en alia studo publikigita sub http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Stalinismus_Sowjetunion_1920-30er.pdf.

[5] Stella Dimitrova Blagoeva (1887-1954) estis la filino de Dimitâr Blagoev, la fondinto de la bulgara socialismo.

# La historiografiaj tabuoj

Kompreneble, por la bulgara komunismo GD havis grandegan signifon, kvazaŭ simile grandan kiel Lenin por Ruslando. Sed en Bulgario kaj en la komunisma bloko la biografio GD ne povis esti kritike traktata, same kiel la tutaj dogmaro, politika kaj praktikado de la komunismo mem, kiu estis perforte enkondukita en Bulgarion, publike ne povis esti kritike analizataj. Dum la komunisma tempo, la historio de Bulgario kaj de aliaj t.n. socialismaj landoj estis reskribata kaj prezentata en rozkolora, nete manipulata kaj tordata maniero, kun la celo kondamni la "faŝisman" (t.e. "burĝan") pasintecon kaj propagandadi la komunisman aferon, kies nova politika-ekonomia ordo devis esti historie pravigata por distingi sin de la Okcidento. Emfazataj estis precipe la gloraj kaj heroaj aspektoj de la bulgara historio kaj de la komunismaj "atingoj", dum la problemoj, negativaj flankoj kaj krimoj de la pasinteco, kiuj povus malkaŝi kaj diskrediti la komunistojn kaj damaĝi la perfektan bildon pri la socialismo kaj pri Bulgario mem, estis prisilentataj, nebuligataj aŭ reinterpretataj. Do, objektiva kaj fidinda historiografio ne ekzistis kaj ne povis ekzisti, kio kaŭzis ke tiel restis multaj blankaj makuloj kaj tabuoj en la pseŭdoscienca bulgara historiografio. Ne havante la eblecon kompari kun la historiografioj de aliaj landoj kaj ne posedante alternativajn informojn kaj informfontojn pri la aferoj kaj eventoj, la homoj en tiuj izolataj kaj fermataj landoj vole-nevole kredis la "veron", kiun la komunistoj trudis al ili. Kiu aŭdacis kontesti aŭ nei la devigan komunisman veron kaj publike rakontis kaj skribis ion alian ol la oficialan version, tiu estis konsiderata kiel danĝera kaj nedezirata ideologia deviaciisto kaj devis enkalkuli gravajn personajn malavantaĝojn, nome la riskon esti persekutata, subpremata aŭ eĉ malliberigata kaj mortigita. La bulgara sekureca servo estis konsiderata de la Okcidento kiel unu el la plej kruelaj en la komunisma mondo entute.[6] Pli objektive trakti la historion de la komunismo oni rajtis nur post ĝia kolapso en 1989. Sed Bulgario apartenas al tiuj landoj, en kiuj oni evidente ne tro entuziasmas kritike trakti la propran historian pasintecon, preferante ĝin netuŝata kaj neprilaborata. Precipe la postkomunismaj politikistoj mem celas eviti seriozan okupiĝon pri la komunisma pasinteco. Malgraŭ tio, pri GD kaj ties envolviteco en la krimaj faroj de la stalinismo kaj komunismo oni nature skribis pli kaj pli ofte, tiel ke oni havas hodiaŭ pli da klareco pri liaj rolo, respondeco kaj kulpo dum la komunisma tempo, almenaŭ dum lia vivotempo.

La enhavo de la oficialaj biografioj pri GD, kiuj aperis en la komunismaj landoj (aliaj apenaŭ aperis), estis kutime kaj grandparte nur tedaj kompilaĵoj de banalaj kaj beligaj propagandaj frazaĵoj pri la "heroa" agado de tiu kanonizata komunisto, krome pri popoldemokratio kaj libereco, paco kaj justeco, socialismo kaj socia progreso, klasbatalo kaj diktaturo de la proletaro, amikeco kaj frateco kun Sovetunio, kondamnindaj faŝismo kaj kapitalismo. Kiel gravaj sloganoj tiuj malplenaj propagandaj vortoj estis gurde ripetataj en ĉiuj oficialaj presaĵoj, kiuj havis la celon nebuligi, manipuli, tordi kaj falsi la historion kaj rakonti fabelojn pri la rolo ludata de la koncernaj protagonistoj, kiuj agis, furoris kaj herois en ĝi. Pri GD, kiu estis laŭdata kiel eminenta kaj samtempe tre modesta personeco, estis emfazataj nur pozitivaj trajtoj kaj konstante remaĉataj liaj heroaj momentoj kaj ŝajnaj meritoj, kiuj faris el li unikan personecon de la homaro: Lia kuraĝa sindefendo antaŭ la Lepsika Tribunalo en 1933 servis por stilizi lin kiel ikonon de la kontraŭfaŝisma propagando, kaj lia rolo kiel enkondukisto de la "socialismo" en Bulgarion en 1944/45 faris el li netuŝeblan kvazaŭ-'sanktulon' de la konstruita marksisma-socialisma-komunisma "revolucio", kiun la popoloj, kiel oni scias hodiaŭ, eĉ ne deziris sed ne povis eviti.

La senlima persona kulto, kiu ekzistis ĉirkaŭ ĉiuj eminentaj stalinistoj, estis praktikata ankaŭ ĉirkaŭ GD mem. En la biografia enkonduko al la Verkaro de GD (Sofia-Press 1976, vol. I), la unua bulgara komunisto estis glorata kiel „sentima batalanto kontraŭ ĉia tiraneco, kontraŭ la sklaveco, por home digna ekzistado, por paco kaj kompreno inter la homoj" kaj ke „dum duona jarcento li investis ĉiujn siajn fortojn por la efektivigo de tiuj ideoj". Plue oni fanfaronis, ke „per sia brila intelekto, lia rimarkinda kapablo li servis senkompromise al la granda afero de la liberigo de la ekspluatitoj, de la sklavigitoj kaj subpremitoj, laboris por la triumfo de la plej humana, progresema demokratio, por la venko de la socialismo kaj komunismo." Ĉio tio restis plumpa kaj mensoga propagandaĉo de la komunisma ideologio. Male, estas ĝenerale konate, ke en la komunismaj landoj regis diktaturo kaj

[6] Vd. ekzemple: J. Baev kaj K. Grozev: Bulgarien. En: Ł. Kamiński, K. Persak kaj J. Gieseke: Handbuch der kommunistischen Geheimdienste in Osteuropa 1944-1991. Göttingen 2009. pp. 143-197.

mallibereco, ‘fragila’ paco kaj drasta senjusteco en ĉiuj rilatoj, dubinda socialismo kaj ekonomia mizero, disfalado de la malnovaj urboj kaj neriparitaj loĝejoj, manko de specialaj medikamentoj (en la senpagaj malsanulejoj) kaj malbona infrastrukturo (en la senpagaj lernejoj), ĝenerala manko de mono kaj senvaloreco de la enlanda monunuo, kiu ne povis esti utiligata por la pagado en eksterlando, altgrada korupto, kronika mankego kaj kaj mizerega kvalito de la varoj por la ĉiutaga uzado, longa atendado por ricevi loĝejon, telefonon, aŭton, manko de vojaĝa libereco kaj de la libera komunikado kun eksterlando, rigora cenzurado de la (banala) gazetaro kaj sistema kontrolado de la poŝttrafiko, prispionado de eksterlandanoj kaj propraj civitanoj, ĝenerala malfido inter la homoj, neta diskriminacio de la etnaj, religiaj kaj civilsociaj minoritatoj flanke de la regantaj stalinistoj-komunistoj, kiuj ĝuis privilegiojn, pri kiuj la popolo povis nur revi, subpremis ĉion nesistemkonforman kaj opozician. Kaj tio ne estas ĉio. Ke en tiuj landoj demokratio en la vera senco de la vorto ne ekzistis, kvankam la propagando palavris pri “popoldemokratio”, oni ne devas aparte mencii. Objektive paroli kaj skribi pri tiuj problemoj kun la celo kulpigi la socialisman sistemon estis severe malpermesite. Hodiaŭ oni bone scias, ke en la koncernaj landoj neniu el tiuj valoroj proklamataj de la komunistoj estis kontentige efektivigataj.

La bulgaroj kredis (aŭ estis devigataj kredi) mitojn, legendojn kaj duonverojn pri sia historia pasinteco, kaj pri GD. Aparte subpremata estis kiel dirite la vero pri la komunisma periodo mem, ĉefe kiam la okazaĵoj estis problemplenaj, hontindaj kaj embarasaj kaj tial devis esti historiegrafie manipulataj kaj falsataj. Tio koncernis precipe la stalinisman periodon en Bulgario, kiu komenciĝis la 9an de septembro 1944 kaj daŭris almenaŭ ĝis post la morto de Stalin en marto 1953. Nur la fama sekreta parolo de Nikita Ĥruŝĉov en februaro 1956, kiam la stalinisma persona kulto estis kritikita kaj kondamnita kaj la krimoj de Stalin malkaŝitaj, la brutala stalinisma sistemo povis esti anstataŭigita per eble iom pli “milda” reĝimo, kiu tamen daŭrigis la principojn de la politika, ekonomia kaj socia sistemo, kiu estis inventita de Lenin kaj “pluevoluigita” de Stalin.

Certe, ne ĉiuj bulgaroj estis idiotoj kaj multaj civitanoj restis tre skeptikaj pri la oficiala propagando, des pli ke oni konsciis pli kaj pli pri la granda abismo inter la teorio kaj realo en la socialisma mondo kompare kun la pli kaj pli bona ekonomia kaj politika situacio en la okcidenteŭropaj landoj. Tamen, signifa disidenta kaj opozicia movado kiel en aliaj socialismaj landoj (kiel Pollando, Ĉeĥoslavakio, GDR aŭ Hungario) ne ekzistas en Bulgario.

La celo de ĉi tiu studo estas okupiĝi pri tiuj iamaj tabuoj, mitoj, legendoj, duonveroj kaj mensogoj ĉirkaŭ la personeco de GD. Ĉar mia artikolo fariĝus tro longa, mi rezignis detale prezenti la historion de Bulgario depost ĝia liberiĝo de la turka jugo ĝis 1949, la jaro de la morto de GD; kaj mi ankaŭ rezignis pri aldono de pli detala biografio de GD – pri ĉio tio oni povas legi aliloke kaj en la koncerna nacilingva fakliteraturo, kaj en la interreto. Nature, estus dezirinde posedi novan, modernan kaj objektivan historion de Bulgario en Esperanto same kiel samtipan biografion pri GD. Sed ŝajnas, ke la okazoj estis maltrafitaj por realigi tiajn projektojn, kiuj evidente ne interesas la Esperanto-movadon, kiu mem estas altgrade propaganda movado de mitoj kaj legendoj (pri Zamenhof, Esperanto k.a.), kiu en multaj rilatoj similas al la komunisma propagando.

Post la morto kaj falo de Stalin la komunismaj partioj en la socialisma landaro ekhavis seriozan problemon, kiu metis ilin en gravan dilemon. La politiko de la stalinismo devis esti tabuigata kaj la gigantaj eraroj kaj krimoj kontraŭ la homeco kaj la universalaj homaj rajtoj, kiuj estis farataj en ĝia nomo, prisilentataj. La temoj, kiuj ne povis esti traktataj kaj kiuj devis resti nemenciataj en la oficiala bulgara komunisma historiografio*, koncernis almenaŭ la sekvantajn historie gravajn epizodojn:

## *1. La rolo de la komunistoj kaj de GD ĉe la atenco kontraŭ la preĝejo de ‘Sankta Dimanĉo’ (Sveta Nedelja) en Sofio la 16an de aprilo 1925.*

Sendepende de la demando, ĉu la komunistoj estis persekutataj de la „faŝistoj” aŭ de iu ajn alia politika forto aŭ ĉu ili konsideris sin „progresema politika forto”, kiu kontraŭbatalas la malbonon kaj luktas por la bono, paco kaj justeco kun ĉiuj permesataj kaj malpermesataj rimedoj, kiel la komunistoj kredis, la Komunisma Partio havis ekde la komenco trajtojn kaj funkciojn de terorisma organizaĵo. La legendecaj terorismaj „ekspropriaciaj” agadoj de la juna Stalin en Tifliso restis en la vigla memoro de la homaro

kiel ´brilaj´ ekzemploj por tiu revolucia terorismo. Kun terorismaj intencoj la (bulgaraj kaj sovetiaj) komunistoj estis enplektitaj ankaŭ en la atenco kontraŭ la ĉeestantoj de iu funebra ceremonio en la katedralo de 'Sankta Dimanĉo' (Sveta Nedelja) la 16an de aprilo 1925 en Sofio, Bulgario. Post la fiaskinta septembra ribelo de 1923 kaj la malpermeso de la Bulgara Komunisma Partio en aprilo 1924 la bulgaraj komunistoj troviĝis en malfacila situacio kaj ili devis ion fari por atingi siajn celojn.

Hodiaŭ oni scias, ke tiu krimo estis planita kaj efektivigita de bulgaraj komunistoj kun la apogo de Komintern en Moskvo kaj de Sovetunio mem. La celo de la atenco estis forigi la gvidajn bulgarajn politikistojn per unu bato por malhelpi la reprezaliojn de la bulgara ŝtato kontraŭ la komunistoj kaj prepari la akaparon de la povo far la komunistoj en Bulgario. Al la tuta diabla plano apartenis unue la mortigo de unuopa altranga bulgara personeco por poste povi atenci kontraŭ tuta grupego de politikistoj, inkluzive la caron mem, kunvenontaj en la katedralo okaze de funebra ceremonio por tiu viktimo. La ideo por la atenco mem devenis de Stefan (Stanke) Dimitrov,[7] tiama sekretario de la CK de BKP. GD, kiu post sia fuĝo el Bulgario en 1923 troviĝis en eksterlando (precipe en Aŭstrio, Svislando, Germanio kaj Sovetunio), estis informita pri la preparado de tiu atenco, en kiu la caro kaj la politika-armea elito de Bulgario devis esti likviditaj. En la komenco de 1925 okazis interkonsiliĝo kun GD kaj Vasil Kolarov, du gvidaj funkciuloj de Komintern en Moskvo. Kvankam GD kaj Kolarov ne konsentis pri tia atenco, ĉar laŭ ilia opinio tia operaco postulus la preparadon de grandskala ribelo post la atenco, ili tamen konsentis, ke la preparoj (ĉu por la atenco, ĉu por la ribelo?) estu lanĉitaj. Per aliaj vortoj, ŝajnas, ke GD ne malaprobis la atencon, ĉar li esperis, ke ĝi kondukos al grandskala ribelo kontraŭ la reganta reĝimo en Bulgario. Do, la sinteno de GD rilate al tiu atenco devas esti konsiderata kiel ambivalenta. Sub la kreskanta politika premo la bulgaraj komunistoj do komencis konkrete prepari la atencon. En decembro 1924 la sakristiisto (!) de la katedralo 'Sveta Nedelja', Petâr Sadgorski, kiu estis simpatianto de BKP, povis esti gajnita de la komunistoj por la kunlaboro. Kiel viktimon por la antaŭ-mortigo de altrangulo, la estroj de la armea (aŭ milita) organizo de BKP, Dimitâr Hadžidimitrov kaj Dimitâr Slatarev, proponis la policestron Vladimir Načev. Dank´ al rektaj kontaktoj kun la sovetiaj komunistoj kaj la sovetia sekreta servo, de kiuj ili ricevis apogon por la plano, la atencantoj povis eviti la kontrolon de Komintern kaj akiri, tra perantoj en Vieno, financajn rimedojn kaj armilojn, inter alie la mortigajn eksplodaĵojn, kiujn Komintern uzadis por siaj atencoj. Post tio aktiviĝis la grupo de Petâr Abadžiev, sub kies kontrolo la eksplodo estis preparita en diversaj ejoj en la proksimeco de la katedralo. La eksplodaĵo, konsistanta el 25 kilogramoj da Pikrinacido kaj TNT, estis metita de Sadgorski en la katedralon en malgrandaj pakaĵoj kaj fiksita sub la granda kupolo. Por la enmetado kaj fiksado de tiu eksplodaĵo Sadgorski ricevis honorarion de 11´000 levoj, krom tio oni promesis al li helpi fuĝi al eksterlando kaj ricevi gravan postenon en Sovetunio. Samtempe, la sakristiisto estis minacita de Abadžiev, ke oni mortigos lin, se li perfidos la atencantojn. Dume, la polico trovis unu el la ejoj de la atencantoj, kaj Jako Dorosiev, estro de la milita organizo de BKP, estis mortigita. Anstataŭ Načev la atencantoj elektis generalon Konstantin Georgiev, la estron de la Sofia distrikto, ano de la registara partio Demokratia Unueco kaj membro de la bulgara parlamento. La 14an de aprilo li estis mortpafita antaŭ la preĝejo 'Sveti Sedmočislenici', kiam li volis viziti diservon. Por altigi la nombron de viktimoj, la komunistoj ankoraŭ dissendis falsitajn invitilojn al aliaj altrangaj funkciuloj por partopreni la funebran ceremonion en la katedralo. Antaŭ la diservo la katedralo ankoraŭ estis vizitita de la polico, kiu dank´ al Sadgorski trovis nenion suspektindan, kaj sekurigita per ringo de la honora gvardio. La eksplodo mem, efektivigita de Petâr Petrov, okazis je la 15h23. Sekve, la krevinta kupolo disfalis en la internon de la katedralo, kiu estis plenplena de homoj kaj tuj mortigis 100 personojn. 500 personoj estis vunditaj, de kiuj multaj ankoraŭ forpasis en la venontaj tagoj. Pro hazardo, la ĉeestantaj membroj de la registaro, ne pereis, sed kelkaj estis tamen vunditaj, ekzemple ĉefministro Aleksandâr Cankov. La caro Boris IIIa mem ne estis trafita de la atenco, ĉar li ne troviĝis en la preĝejo. Kontraŭ li jam okazis murdatenco antaŭ kelkaj tagoj, en kiu li evitis perei. Bilance, pro la atenco pereis 12 generaloj, 15 koloneloj, 7 ĉefleŭtenantoj, 3 majoroj, 9 kapitanoj kaj 3 parlamentanoj, krome pli ol 25 virinoj kaj infanoj. Ankoraŭ en la sama vespero estis proklamita la milita stato en Bulgario (kiu daŭris ĝis oktobro). Ĉi tiu atenco estis la plej grava de sia speco en Eŭropo en la 19a jarcento. Post la atenco, la bulgara polico senkompate kaj rigore persekutis la komunistojn en Bulgario, kun multaj mortviktimoj, dum Petâr Petrov, Dimitâr Slatarev kaj Nikola Abadžiev sukcesis fuĝi tra Jugoslavo al Sovetunio. Petâr Sadgorski estis kaptita de la polico kaj konfesis sian pekon. Marko Friedman, alia membro de la militorganizo de BKP, klarigis, ke la preparado de la atenco estis financita

[7] La bulgara urbo Dupnica portis lian nomon en la jaroj 1948-92, kie oni starigis grandan monumenton honore al tiu komunisto.

de Sovetunio, kiu liveris la eksplodaĵon, kaj ŝovis la respondecon por la atenco al Kosta Janev kaj Ivan Minkov. La mortpunon ricevis krom Sadgorski, Friedmann kaj Georgi Koev, kiu evidente estis ekzekutita, ankaŭ aliaj kiel Stanke Dimtrov, kiu povis fuĝi, dum Petâr Abadžiev kaj du aliaj estis mortigitaj jam antaŭ la tribunala proceso.[8] BKP poste klopodis blankigi sian veston de la suspekto esti organizinta tiun teruran krimon, kiu evidentiĝis kiel plena fiasko por la komunistoj, tiel, ke oni disvastigis tra la oficiala bulgara komunisma historiografio la version, ke la kulpon pri la preparo de la atenco kontraŭ Sv. Nedelja portis la „ultramaldekstraj komunistoj, kiuj apartigis sin de la partio, uzante la entuziasmon de la batalo kontraŭ la faŝisma teroro“. En sia fina parolado dum la lepsika proceso lige kun la Reichstag-incendio GD kontestis la respondecon de BKP pri la atenco en Sofio kaj ŝovis la kulpon pri la tuta afero al la bulgara polico.

## *2. La rolo de GD dum la Lepsika Reichstag-proceso de 1933 kaj la diskuto pri la karaktero de la faŝismo.*

Ĉi tiu aparta temo ne estas detale traktebla kadre de ĉi tiu studeto, kiu koncentriĝas ĉefe pri la stalinismaj aferoj lige kun GD. Por trakti ĝin kaj por kompari la oficialan version, kiun la komunisma historiografio disvastigis, kun la veraj okazaĵoj, necesus legi la koncernajn notojn en la Taglibro de GD, la ĉi-koncernan libron de GD aperigitan en Berlino en 1946[9] kaj la ceteran fakan literaturon verkitan pri la lepsika proceso lige kun la Reichstag-incendio kaj la rolo de GD en la proceso.[10] Kiel konate, en la centro de la kontraŭdira diskuto staras la hipotezoj pri la individua kulpo de Marinus van der Lubbe, pri la instigo de la incendio fare de la nacisocialistoj kaj pri la envolviĝo de la komunistoj, kiuj estis kulpigitaj de la nacisocialistoj, ke ili bruligis la konstruaĵon. Ĝenerale akceptata en la internacia historiografio estas la unua versio. Certe, ankaŭ tiuj problemoj ne povis esti libere kaj ´objektive´ traktataj en la socialismaj landoj sed estis prisilentataj aŭ nebuligataj. Lige kun la liberigo de GD kaj de la du aliaj akuzitaj bulgaroj, kiuj en iu oportuna momento ricevis la sovetian ŝtatanecon (ĉar la bulgara registaro rifuzis akcepti ilin en sia patrujo), aperis ankaŭ la hipotezo pri eventuala interkonsento inter NKVD kaj Gestapo. Sed tia hipotezo provokas aliajn tiklajn demandojn lige kun la „doktrino pri la totalismo”, ĉar tiel ekzistus la danĝero trakti la komunismon kaj la nacisocjsmon kvazaŭ egale sur la sama nivelo, kion certaj politikaj kaj historiistaj cirkloj tamen nepre volis/as eviti. (Sed la debato pri la totalismo estu traktata en alia okazo. Ĉi-okaze mi menciu ĉi tie la libron „La Faŝismo“ de Ĵeliu Ĵelev, kiu inter 1990 kaj 1997 estis prezidento de Bulgario. En ĝiaj enkondukaj notoj li faris aludojn pri komunaj trajtoj de faŝismo kaj komunismo. Sur p. 38 de la Esperanto-eldono, 1990, la aŭtoro citas frazon, kiun GD skribis pri la totalisma ŝtato. Laŭ GD, la totalisma ŝtato estas tia speco de ŝtato, kiu strebas, unue „al perforta malfondo de ĉiuj aliaj partioj kaj organizaĵoj“; kaj, due, al „unuecigo de la ekonomiaj, ŝtataj, kulturaj, militaj, sportaj, junularaj, ekleziaj kaj aliaj institucioj, de la gazetaro, propagando ktp.“, alivorte al unuecigo de la tuta socia vivo, kiel Ĵelev resumis. Sen komenti tiun frazon, kiu originas de GD el la tempo de la proceso lige kun la Reichstag-incendio, oni povas sin demandi, kial GD ne reuzis la saman frazon, kiam necesis analizi la karakteron de la komunisma totalisma ŝtato, ĉar GD ja estis informata pri la karaktero de la totalisma ŝtato, kaze ke li mem skribis la koncernan frazon).
Legindan resuman analizon pri la aktuala situacio de la esploroj kaj diskutoj verkis Ernstgert Kalbe (en la sube menciita kajero de 2001), kiu dume devas sufiĉi kiel fonto por esploreti ĉi tiun temon. Precipe la komunistoj mem emfazas la gravan kontribuon de GD al la „kontraŭfaŝisma batalo“ dum la nacisocialisma tempo kaj altgrade laŭdas lin kiel „la heroon de Lepsiko“. Efektive, la persona kuraĝo, kiun GD montris dum la lepsika Reichstag-proceso, precipe kiam li estis konfrontita kun Göring kaj

---

[8] Laŭ https://de.wikipedia.org/wiki/Bombenanschlag_auf_die_Kathedrale_Sweta_Nedelja.
[9] Vd. Georgi Dimitroff: Reichstagsbrandprozess. Dokumente, Briefe und Aufzeichnungen. Berlin 1946.
[10] Parton de la nacilingva faka literaturo, kiu kritike traktas la incendion, kiu mem fariĝis legendo (kaj el kiu la komunistoj forĝis sian propran legendon), vd.: B. Stoller-Trinks: Der Reichstagsbrand im Licht kommunistischer Propaganda, 1973; P. Gregoire: Der Reichstagsbrand, 1978; D. Deiseroth: Der Reichstagsbrand, 2005; S.F. Kellerhoff: Der Reichstagsbrand, 2008; M. Giebeler: Die Kontroverse um den Reichstagsbrand, 2010, W. Kugel: Der Reichstagsbrand, 2013; A. Bahar: Der Reichstagsbrand, 1992/2013. La proceso estis rekonstruita en scena legado kaj aŭskultebla sub http://www.youtube.com/watch?v=pFjsAK_X9Vc.

Goebbels, estis konsiderata kiel eksterordinara, rimarkinda kaj aprezinda. Sed ĉu GD anticipe sciis, ke li estos savita kaj liberigita, tiel ke li povis permesi al si tian firman konduton? Ŝajnas, ke tiu kuraĝo komplete forlasis lin, kiam lia „partnero" fariĝis Stalin, kiu ne estis malpli granda barbaro ol la menciitaj germanaj ĉefnazioj, sed kiun GD en principo ne povis kritiki, ĉar li troviĝis sur lia flanko. Lia „kuraĝo" tamen ankoraŭfoje revenis, kiam en januaro 1948 dum la fama „konsultiĝo" kun Stalin en Moskvo GD kunpuŝiĝis kun la sovetiaj gvidantoj lige kun la diskuto pri la planata balkana federacio. Tiam GD aŭdacis averti la sovetian flankon, ke estas malutile, se en la gazeto *Pravda* aperas artikoloj, kiuj publike montras, precipe al la malamikoj, diferencojn inter la sovetiaj kaj bulgaraj komunistoj. Certe, Stalin malfacile digestis tiun kritikan averton.

Jen estu tamen aldonitaj ankoraŭ kelkaj rimarkoj pri la „aŭtentika" faŝimo-doktrino de GD, kiu estas grandparte nekonata kaj eble iom interesa en ĉi tiu kunteksto. Por doni al sia propra „faŝismo-teorio" apartan aŭreolon, antaŭ la pleno de la VIIa Monda Kongreso de Komintern en aŭguto 1935 GD formulis la hipotezon, laŭ kiu la faŝismo, post kiam ĝi akaparis la povon, aperas en formo de „la malferma, terorisma diktaturo de la plej reakciaj, ŝovinismaj kaj plej imperiismaj elementoj de la financkapitalo." Per aliaj vortoj, en tiu momento, kiam la kapitalismo estas minacata, ekzemple flanke de la revolucia movado kiel en la fruaj 1920aj jaroj en Italio aŭ dum la monda ekonomia krizo en Germanio, tiam la burĝa demokratio (parte maskita kiel pseŭdodemokratio) reagas per transformiĝo al faŝisma diktaturo, konservanta la utiligon de la kapitalo ankaŭ per plej brutalaj rimedoj.[11] Povas esti, ke tiu hipotezo taŭgis por pritaksi la hitleran diktaturon, kiu baziĝis sur la burĝa kapitalismo. Sed ĉu (la evidente iom naiva kaj ideologie blinda) GD ne rimarkis, ke la sama hipotezo en principo analoge validas ankaŭ por la stalinismo, kiu fariĝas eĉ pli agresema diktaturo, kiam ĝi sentas la bezonon defendi la socialismon, aŭ komunismon per eĉ pli brutalaj rimedoj (ekzemple en formo de la ĝenerala subpremado aŭ eĉ amasa likvido de „klasmalamikoj", per la devigo de senpagaj laborfortoj en la gulaga sistemo aŭ per la ideologia-politika subpremado de tutaj popoloj pere de la polico, sekretservoj, armeo) ? Do, por eviti, ke la homoj venu al la ideo kompari la komunisman totalismon kun la nacisocialisma totalismo, aŭ inverse, en la socialismaj landoj tia publika (politika kaj akademia) diskuto pri la problemoj de la „totalismo(j)" ne eblis kaj estis rigore malhelpata.

Ŝajnas, ke post sia liberigo de la lepsika proceso GD ne emis iri al Sovetunio, sed li preferis reveturi al Bulgario, aŭ al Francio. Sed caro Boris III. ne volis revidi lin en sia lando. En la kazo de sia reapero en Bulgario GD devintus enkalkuli la riskon, ke la verdikto de la mortpuno, esprimita kontraŭ li en la jaro 1923, estas renovigita. Aliflanke, okazis jena mirindaĵo: Kiam Hitler, jam akaparinte la povon, invitis la bulgaran caron viziti Germanion, la caro rifuzis la inviton, sendante al li jenan skriban respondon: „Tiom longe ke vi ne liberigas la senkulpan bulgaran civitanon Dimitrov el la malliberejo, mi ne povas viziti Germanion." Ĉu en la kazo de GD do eĉ okazis iu diplomatia aranĝo inter la bulgara caro, Hitler kaj Stalin? Jen, indas kaj utilas koni ankaŭ tiajn faktojn.[12]

## *3. La rolo de GD en Komintern.*

Post la akcepto de GD en Sovetunio, la bulgaro estis puŝita transpreni la gvidon de Komintern. Ĉu GD tion mem volis ne estas konate. Ŝajnas, ke GD ĝuis la principan fidon de la sovetia gvidanto, almenaŭ ĝis la militfino. Pro sia neskuebla blinda amo al Sovetunio kaj sia senlima admirado de la aŭtoritateco de Stalin, GD gvidis en Komintern politikon, kiu unuflanke apogis la politikon de USSR kaj aliflanke estis sendependa de ĝi por esti perceptata kiel politiko efektivigonta la interesojn de la mondrevolucia procezo. Okupata de la komunismaj agado kaj propagando, GD senkompromise defendis Sovetunion kiel specon de enkarniĝo de la socialismaj esperoj. En tio li ne nur forte troigis, sed verŝajne ankaŭ tro malatentis la gigantajn stalinismajn misformadojn, se entute li rimarkis ilin. Estas klare, ke en tia situacio ankaŭ GD aŭtomate estis enplektata en la memdetruan subpreman politikon de Stalin (laŭ Kalbe) kaj fariĝis ĝia viktimo. Certe, por pli bone kompreni la rolon de GD en Komintern la koncernaj

[11] Mi tro malbone konas la detalojn de la marksismo por determini, ĉu tiu hipotezo de GD povas esti konsiderata kiel aŭtentika aŭ ĉu ĝi estis transprenita de unu el la marksismaj teoriistoj.
[12] Laŭ Pavel Pisarev.

notoj en lia Taglibro devus esti prenataj aparte sub la lupeon, precipe lige kun la ŝanĝo de la popolfronta politiko kaj de la ekstera politiko de Moskvo. Sed tio devus esti farata kadre de alia, aparta studo. Iuj analizantoj tamen opiniis, ke GD faris ne nur nemezureblan servon al Komintern, sed kapablis dume savi ĝin de eĉ pli granda katastrofo. Povas esti. Kiu scias ?

Kiel GD kaj la komunistoj reagis pri la malfondo de Komintern ? Laŭ Wolfgang Leonhard, la haste realigita malfondo de Komintern en majo 1943, do meze dum la milito, estis granda surprizo ne nur por la EKKI-funkciuloj[13] mem, kiuj ellaboris, subskribis kaj publikigis la tekston de la decido, sed ankaŭ por la komunismaj partioj kaj gvidantoj de la mondo, kiuj ne estis anticipe konsultataj, aŭ preparataj. La teksto de la decido unue aperis en la revuo *Kommunističeskij internacional* kaj poste en *Pravda*, tra kiu la monda publiko eksciis pri la evento.[14] La 21an de majo 1943 *Berliner Zeitung* raportis pri la evento kun jenaj sciigoj. La koncerna kunsido okazis en la laborĉambro de Stalin. Molotov laŭtlegis la decidon de la EKKI-prezidio pri la malfondo de Komintern. Kalinin rimarkigis, ke la malamikoj certe eluzos ĉi tiun paŝon kaj sugestis transloki la centron de Komintern al alia urbo, ekzemple Londonon (kion oni trovis ridinda). Stalin klarigis, ke la spertoj kaj en la tempo de Markso kaj Engels kaj en la nuntempo montrus, ke ne eblas gvidi la laboristan movadon de ĉiuj landoj de unusola internacia centro. Precipe nuntempe sub la kondiĉoj de la milito, kiam la komunismaj partioj en Germanio, Italio kaj aliaj landoj havas la taskon renversi siajn registarojn kaj sekvi la taktikon de la defetismo, dum la komunismaj partioj en USSR, Anglio kaj Usono kaj en aliaj landoj havas la taskon subteni siajn registarojn, por ke la malamiko povu esti disbastita kiel eble plej baldaŭ. Stalin aldonis, ke oni supertaksis siajn fortojn, kiam oni fondis Kominternon en la kredo, ke oni povos stiri la movadon en ĉiuj landoj. Tio estis eraro. La plua ekzistado de la organizaĵo signifus diskrediti la ideon de la Komunisma Internacio, kion oni devas eviti.[15]

Por klarigi la verajn kaŭzojn kaj kompreni la fonon de la forigo de Komintern estis farataj diversaj provoj kaj klopodoj. Kiel Karl Schlögel atentigis, Komintern fakte finludis sian historian rolon jam kelkajn jarojn antaŭe, kaj ĝia malfondo estis nur prokrastita kaj demando de la oportuna momento.[16] Ŝajnas, ke ĉi tiu oportuna momento alvenis post la invado de Wehrmacht en Sovetunion kaj la formiĝo de la kontraŭ-hitlera koalicio inter Sovetunio kaj la okcidentaj potencoj, de kiuj Stalin dependiĝis por venki la germanojn. Krom la krizo de la komunismo en Usono, alia aspekto estas, ke ŝajnas, ke Moskvo celis kredigi al la mondo, ke la komunismaj partioj en la diversaj landoj ne dependas de Moskvo, ke ili ne bezonas la ligon kun ĝi kaj ke ili povas agi kiel memstaraj partioj en siaj propraj landoj por ludi sian historian rolon. Kio ne aŭtomate signifis, ke ili liberiĝis de la financa subteno de Moskvo aŭ ke ili ĉesis esti instrumentoj de la sovetia politiko. Iuj historiistoj vidis ankoraŭ aliajn aspektojn, nome la transiron de la internaciismo, pri kiu Stalin pli kaj pli fajfis, al la sovetia patriotismo, kiu fariĝis esenca ideo dum militaj tempoj kiam necesis defendi la patrujon kun ĉiuj patriotaj fortoj. Kun tiu patriotismo estis samtempe ligita la strebado de Stalin havigi al sia lando la statuson de grandpotenco, precipe post la milito. Tiu estis ankaŭ la klarigo de Đilas, kiu komprenis la malfondon de Komintern tiel, ke Stalin celis fortigi la „ŝtatan, imperian pozicion de USSR“.[17] Dedijer konfirmis en sia Tito-biografio, ke la malfondo de Komintern okazis pro la premo de la okcidentaj grandpotencoj. La malaperigo de Komintern, kiu fariĝis balasto kaj finfine nur ĝenis la intencojn kaj planojn de la sovetia gvidanto, do ne estis multe bedaŭrata, krom eble de iuj malnovaj komunistoj-bolŝevikoj (sed multaj ne plu vivis, dum aliaj estis forpelitaj de la lando kaj aliaj malliberigitaj en la gulago). Sovetunio ja restis la patrujo de la internacia laborista kaj komunista movado, do iu aparta burokratia organizaĵo kiel Komintern ne plu estis bezonata. Ŝajnas do, ke finfine pluraj faktoroj kaŭzis la likvidon de Komintern. La likvido de Komintern vdertre servis al Stalin poste ankaŭ por povi ŝovi la tutan kulpon pri la fiasko al GD, kion li ankaŭ ne hezitis fari (vd. sube). Do, ankaŭ ĉi tiu epizodo montras, ke Stalin esence misuzis GDn nur kiel ludfiguron sur la ŝakbreto, ĉar li sciis, ke la centprocente lojalaj bulgaroj nepre plenumos lian volon, kompare kun la jugoslavoj, kiuj estis pli kapricaj, memstaraj kaj malobeemaj.

---

[13] La nomarojn vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Kategorie:EKKI-Mitglied kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Kategorie:Komintern-Funktion%C3%A4r.

[14] La tekston (germanlingvan) kun iom da komento vd. sub http://www.1000dokumente.de/pdf/dok_0026_auf_de.pdf.

[15] Vd. http://www.berliner-zeitung.de/archiv/ein-grosser-fuehrer-und-mittlere-kader--aus-dimitroffs-tagebuechern-aufloesung-der-komintern,10810590,9842892.html.

[16] Karl Schlögel: Terror und Traum. Moskau 1937. Ffrt. 2010, p. 521.

[17] Vd. Đilas, Memoroj (germana eldono 1992), p. 151.

Dum la membroj de EKKI ankoraŭ iom diskutis ĉefe pri proceduraj kaj precedencaj demandoj de la likvido de Komintern – granda kontraŭstaro flanke de tiuj homoj ne plu ekzistis -, ŝajnas, ke GD mem ne plu ludis gravan rolon, krom konsenti pri la malfondo de la organizaĵo kaj lojale kunlabori en la ellaboro de la decida teksto. En tiu senco GD notis en sia Taglibro la 8an de majo 1943, ke li renkontiĝis nokte kun Manuil´skij kaj Molotov por diskuti pri la estonteco de Komintern kaj ke ili venis al la konkludo, ke ĝi ne plu taŭgas kiel gvidcentro por la komunismaj partioj. La 10an de junio la decido ekvalidis kaj Komintern ĉesis ekzisti. En ĉi tiu tago GD notis en sia Taglibro, ke la teksto kun la decido aperis en *Pravda* kaj ke okazis kunsido kun Nogin kaj Ĥodov por preapri la transdonon de la arkivo de EKKI al la CK de KPSS, por kio GD donis la necesajn ordonojn. Du tagojn poste li menciis ankoraŭ iun „kunsidon pri la likvido de la aferoj de Komintern", kiun ĉeestis krom li mem Manuil´skij, Ercoli (Togliatti), Pieck kaj Suĥarjov. Povas esti, ke GD private bedaŭris tiun evoluon, sed ŝajnas, ke lia persona influo por mem decidi pri ĝi estis limigata kaj li mem ĝia nura administranto, ĉar ĉio dependis la volo de Stalin persone.[18] Sed kiel enkonduke dirite, la rolo de GD en Kominter devus esti ankoraŭ pli ekzakte esplorata.

## *4. La rolo de GD dum la stalinisma "Granda Teroro" en Sovetunio precipe en la jaroj 1936-38.*

En la vico kun Molotov, Mikojan, Jeĵov, Voroŝilov, Kalinin, Kujbiŝev, Kaganoviĉ, Bulganin, Ĥruŝĉov, Ĵdanov, Jagoda, Berija, Manuil´skij, Kuusinen k.c. kamaradoj de la stalina koterio, GD faris multajn komunajn aferojn kun tiuj lojalaj lakeoj-satrapoj de la sovetia gvidanto. Certe, la reciprokaj rilatoj inter tiuj komunistoj devus esti pli profunde studataj. Dum la "Granda Teroro" (1936-38) GD mem timis estis purigita kaj likvidita. Por eviti tian sorton kaj povi konservi siajn oficojn kaj funkciojn, necesis montri lojalan kaj hipokritan konformisman oportunismon kaj klopodi servi ĉiujn dezirojn kaj plenumi ĉiujn ordonojn de la sovetiaj gvidantoj, al kio apartenis ankaŭ la aprobado de la teroro kaj la partoprenado en la denuncado de aliaj komunistoj. La denuncado estis unu el la ĉefaj pilieroj kaj praktikoj de la stalinisma sistemo. La notoj, kiujn GD faris en tiu tempo en sia Taglibro, postlasas konfuzan kaj enigman impreson. Unuflanke, pri la proceso kontraŭ la "trockiistoj" GD skribis en decembro 1936, ke li „ne povas kompreni, kial la akuzitoj faris tiajn krimojn", „kial ĉiuj akuzitoj konfesis ĉion en la scio, ke tio povas kosti ilian vivon", „kial krom la konfeso ne estis submetitaj pruvoj al la akuzitoj" kaj „kial oni esprimis tiajn drastajn punojn kontraŭ politikaj kontraŭuloj, kvankam la sovetia reĝimo ja estas tiom potenca, ke flanke de tiuj, kiuj sidis en la malliberejo, danĝero ne minacis". Laŭ GD, „la protokoloj de la proceso estis malbone kompilitaj, estas plenaj de kontraŭdiroj kaj ne estas konvinkaj". Ŝajnas, ke tiuj aferoj estis diritaj, kiam la germanaj verkistoj Lion Feuchtwanger[19] kaj Maria Osten vizitis lin (la 18an de decembro 1936). Tiuj kaj la plej lasta frazo postlasas la impreson, ke GD ŝajne komprenis, ke la procesoj estis efektivigitaj treege strange, indignige, finfine malserioze, maljuste kaj konkludiĝis kiel farso. Povas esti, ke lia malbona konscienco tamen torturis lin, sed li ne povis publike plendi aŭ protesti. Ĉiu kritikisto povis esti konsiderata kiel malamiko, kaj en principo malaperigita. Aliflanke, en alia Taglibra noto, skribita la 2an de februaro 1937, post nova akcepto de Feuchtwanger kaj Osten, GD memorfiksis lige kun la proceso kontraŭ la „trockiistoj", ke „la sabotado, spionado kaj teroro estas pruvitaj", ke „Trockij inspiris kaj gvidis ilin" ktp. Plue: La akuzitoj „estas malamikoj, kiuj meritas esti neniigitaj" (kvankam „ili ne agis pro personaj interesoj"). GD ne komprenis, kial okazas „tia bruo ĉirkaŭ la proceso", tiel ke eĉ „en la popolo aperis etoso de eksterordinara maltrankvilo, reciprokaj suspektoj, denuncoj ktp." GD konkludis, ke „la trockiismo estas morta, kial do ankoraŭ tia kampanjo!" Kiel "vere historian" eventon GD entuziasme laŭdegis en sia *Taglibro* en la noto de la 5a de marto 1937 la fifaman

[18] En la Elektita Verkaro de GD (Sofia Press 1976) artikolo pri Komintern kaj ĝia likvido komplete mankas.

[19] Leginda estas en ĉi tiu kunteksto lia sensacia libro "Moskvo 1937", kiu kaŭzis en Okcidento laŭtan konsternon, ĉar la fama germana verkisto ŝajnis en princip konsenti pri la stalinisma politiko kaj aparte aprobis la farsprocesojn kontraŭ la „trockiistoj".

plenkunsidon de KPSU de februaro-marto 1973, dum kiu Stalin en sia parolado „Pri la mankoj de la partia laboro kaj rimedoj por la likvido de la trockistoj kaj aliaj hipokrituloj”[20] decidis ´elŝanĝi´ ĉiujn partiajn funkciulojn, kiujn li suspektis nelojalaj kaj preparis la proceson kontraŭ Buĥarin, Rykov kaj 19 aliaj partiaj kamaradoj. En alia noto de la 7a de novembro 1937, en kiu okazis interparolado kun Stalin, kiu invitis la supre menciitajn kaj aliajn ‘samideanojn’ manĝi kun li, GD trinkis je la “kamarado Stalin“, kiu akceptis la ovaciojn de siaj lakeoj, kaj konfirmis la ĝustecon de la neceso de la „senkompata batalo kontraŭ la malamikoj” kaj ke li „faros ĉion laŭ fortoj, por ke tio estu efektivigita ankaŭ en la vicoj de Komintern.” GD diris, inter alie, ke „oni ne povas paroli pri Lenin sen ligi lin kun Stalin”. Iosif Visarionoviĉ, kiu sentis sian flatata, laŭdis la „mezan tavolon de gvidantoj” de la partio kaj konfirmis la amikecon kun GD, sed samtempe li atentigis, ke li „ne konsentas kun li” kun la riproĉo al la adreso de GD, ke li „eĉ esprimis sin nemarksisme”. Ĉu tio estis ŝerco aŭ minaca aludo ne estas klare. Eble tiu stalina rimarko estis signalo por GD, ke li devis bridi sian iom tro aktivan langon. GD verŝajne notis tiujn rimarkojn, ĉar probable ili impresis lin. Kelkajn tagojn poste, kiam GD denove estis akceptita de Stalin en Kremlo, li notis en sia Taglibro, konforme al la decido de la interparolo: „Fortigi la batalon kontraŭ la trockiistoj ĉe ĉiuj frontoj. Tio ne sufiĉas. La trockiistoj devas esti ĉasataj, pafmortigitaj, neniigitaj. Tiuj internaciaj provokistoj estas la plej teruraj agentoj de la faŝismo.” Kaj kelkajn tagojn poste GD memorfiksis, post nova *privata* interparolo kun Stalin: „Stasova-n ni arestos. Ŝi evidentiĝis kiel kanajlino. Ankaŭ Kirzanova, kiu estis intima amikino de Jakovleva, estas kanajlino.[21] Münzenberg estas trockiisto. Kiam li alvenos, ni tuj arestos lin. Klopodu logi lin ĉi tien.”[22]

La oficiala bulgara komunisma historiografio* kaj la biografio de GD prisilentis la farsprocesojn okazintajn en Sovetunio en la jaroj 1936-38 kontraŭ Zinov´ev, Kamenev, Pjatakov, Radek, Tuĥaĉevskij, Rykov, Buĥarin, Jagoda k.a. En mallonga alineo estis menciite, ke en tiuj jaroj „devis est farita la decida bato kontraŭ la danĝero de la maldekstra deviacio kaj de la dekstra deviacio kaj aparte ankaŭ kontraŭ la ´maldekstraj´, sektemaj, doktrinecaj elementoj, kiuj malhelpis kun siaj limigiteco, rigideco, skemismo kaj pro manko de ligiteco kun la vivo la aplikadon de la nova kurso“ (Dimitrov-biografio, Sofio/Dietz Berlin 1972, p. 209). Kion ĉio tio signifis en la praktiko kaj kial tiuj procesoj okazis, la leganto nature ne eksciis.

Kiel Pavel Pisarev atentigis, en la sovetia gulago troviĝis ĉirkaŭ 500 bulgaroj. GD klopodegis por liberigi ilin (aŭ iujn el ili), sed li ne sukcesis kaj neniu atentis liajn petleterojn.

Ankaŭ Vasil Tanev kaj Blagoj Popov, kunlaborantoj de GD en la Okcidenta Oficejo en Berlino kaj la du kunakuzitoj en la lepsika proceso, estis poste persekutataj de la stalinisma reĝimo kaj senditaj al koncentrejoj en Norda Ruslando. En 1941 Tanev pereis post paraŝuta salto super Bulgario, kie li estis arestita kaj mortpafita. Post 17-jara restado en diversaj lagroj de la gulago, Popov estis politike rehonorigita kaj ricevis la postenon de la ambasadoro de PR Bulgario en GDR. Malsana li finis sian vivon en 1968 en Varna, finverkinte siajn memuarojn pri la aresto en Sovetuno, kiuj estis sekrete senditaj al eksterlando kaj presitaj en Parizo en 1981. En Bulgario ili povis aperi nur en 1991.[23] Do, GD ne povis savi ĉiujn samideanojn, kiujn la faŭkego de la stalinisma gulago forglutis, kvankam multaj viktimoj esperis je la helpo de GD, ĉar ili kredis lin grava kaj influa komunisto kaj proksimulo de Stalin. Ke al GD ofte mankis la necesaj influo kaj potenco por ĝuste solvi tiajn konkretajn problemojn, restis kompreneble prisilentite de la bulgara historiografio.

---

[20] Vd. http://www.1000dokumente.de/index.html?c=dokument_ru&dokument=0022_sta&object=pdf&st=&l=de. Vd. Karl Schlögel: Terror und Traum. Moskau 1937. Ffrt. 2010, p. 239.

[21] E.D. Stasova (1873-1966) estis elstara aktivulino de KPR(B) kaj Komintern, kie ŝi organizis la purigadon de iuj membroj. K.I. Kirzanova (1888-1947) estis alta funkciulino de la sovetia altlerneja sistemo kaj de la sovetia virina movado. V.N. Jakovleva (1884-1941), kiu estis envolvita en la kontraŭ-trockiistan farsproceson, estis mortpafita. Tiuj virinoj havis seriozajn konfliktojn kun la partio, kio ne malhelpis, ke ili ankaŭ ricevis altajn ordenojn.

[22] Münzenberg, persona konato de Stalin, estis influa germana komunisto de la intermilita tempo, kiu en 1937 forlasis la oficialan stalinisman linion. Li estis ekskludita el la KP kaj fondis novan socialisman partion. Lia vivo finiĝis mistere en Francio en 1940. Maria Osten, alias Gresshöner, sekvis en 1932 la sovetian verkiston Miĥail Kol´cov al Moskvo, kie ŝi laboris kiel ĵurnalistino. Ŝi partoprenis en la Hispana Milito (1936-39) flanke de la interbrigadistoj. Kiam Kol´cov estis arestita, akuzita kiel trockiisto kaj likvidita en 1940, ankaŭ Maria Osten ekhavis seriozan problemon. Ĉar kiel sovetia civitanino ŝi ne rajtis forlasi la landon, ŝi mem estis arestita en 1941 kaj mortpafita en 1942 kiel laŭdira franca spionino.

[23] La bibliografiajn indikojn vd. sub: http://de.wikipedia.org/wiki/Blagoi_Popow.

## *5. La rolo de Komintern ĉe la likvido de la Pola Komunisma Partio en 1937.*

Kiam Stalin konstatis, ke la Pola Komunisma Partio realigis ultramaldekstran aventurecan politikon por poste same lojale apliki la popolfrontan politikon, komenciĝis malfacila periodo ankaŭ por polaj komunistoj. En 1937 preskaŭ ĉiuj polaj komunistoj, kiuj vivis en Sovetunio, estis arestitaj. La gvidantoj de KPP, inter ili la ĝenerala sekretario Lenski kaj la 70-jara Warski, unu el la fondintoj de la socialdemokratia kaj komunisma partioj de Pollando, estis mortpafitaj. En sekva konkluda decido EKKI iniciatis la malfondon de KPP. Post kiam Stalin estis informita pri tiu decido de la 28a de novembro, kiu estis subskribita de GD, li klarigis al GD: „Kun la malfondo ni venis ĉirkaŭ du jarojn tro malfrue. La malfondo devas esti, sed laŭ mia opinio oni ne devus publikigi tion en la gazetaro.“ (Fonto: GD-Taglibro, noto de la koncerna tago).

## *6. Privataĵoj: GD en Moskvo, GD kaj la virinoj kaj Mitja.*

La privata vivo de komunismaj funkciuloj estis publike strikte tabua, kaj detalojn eblis ekscii nur pere de iuj klaĉoj, kiujn certaj bone informataj ´insajderoj´ disvastigis eksteren. Koncerne lian geedzan vivon estas konate, ke GD unue edziĝis al la serba poetino, komunistino-sindikatistino Ljub(ic)a Ivošević, kiu lernis la profesion de teksaĵistino-modistino.[24] Ljubica, kiu estis karakterizita kiel nekutime maldika, delikata kaj inteligenta figuro, frekventis la modistan lernejon en Vieno kaj poste laboris kiel tajlorino en Bulgario, kie ŝi kudris vestaĵojn por la nobla socio kiel ankaŭ por la familianoj de caro Ferdinand. Kun GD ŝi ne havis infanojn, ĉar evidente ŝi estis malfekunda. La historiisto Lazar Velev raportis, ke kun Ljub(ic)a okazis vera tragedio. Pro la multaj amatinoj, kiujn GD havis, ŝi fariĝis tiel ĵaluza kaj estis plagata de la malfideleco de sia edzo, ke ŝi finfine psike malsaniĝis kaj devis esti transdonita al iu sanatorio ekster Moskvo (probable Barviĥa). Ĉu tie ŝi estis retenata de Stalin ankaŭ kiel speco de asekuraĵo (per intrigoj Stalin kutimis enmiksiĝi ankaŭ en la privatan vivon de siaj kamardoj), estas iom enigma afero. Post kiam GD estis arestita lige kun la Reichstag-incendio, ŝia stato draste malboniĝis. La 27an de majo 1933 ŝi decidis fini sian vivon kaj saltis de la plej supra etaĝo de la sanatorio.[25]

La dua edzino de GD estis la ĉeĥoslovakia judino Roza Jul´evna Flajšman. Stalin persone elektis ŝin por GD,[26] kaj kiel peranton li kontaktis la ĉeĥan komuniston Rudolf Slánský (kiu ankaŭ devenis de juda familio).[27] Ŝajnas, ke Roza, kiu bone sciis „kiel oni ludas laŭ la reguloj de la revolucio”, estis agentino de la sekretaj servoj.[28] Kvankam la komunistino Roza estis fanatika ateistino, la geedziĝo okazis en Bulgario laŭ religia rito, ĉefe pro la deziro de la pia patrino de GD, Paraŝkeva Doseva, kiu apartenis al la protestanta eklezio. Stalin, iama lernanto en pastra seminario, konsentis. La paron geedzigis la protestanta pastoro Vasil Zjapkov, kiu unu jaron poste en farsproceso mem estis kondamnita al dumviva puno en malliberejo. Kun Roza GD havis la komunan filon Dimitâr, nomata Mitja. Kun tiu Mitja okazis alia tragedio. La 21an de marto 1943 Mitja, tiam nur 7-jara, subite malsaniĝis. Baldaŭ poste, la 3an de aprilo, li forpasis, laŭ la oficiala versio pro difterio. Sed laŭ la esploroj de la historiisto Lazar Velev, Mitja estis mortigita de KGB.[29] GD, tre ŝokita pro tiu incidento, ekhavis dubojn pri la oficiala versio (ĉar Mitja troviĝis en vilao ekster Moskvo, oni ne povis demandi kiel li povis esti infektita) kaj la 12an de junio skribis leteron al Lavrentij Berija, la tiama popolkomisaro pri internaj aferoj (NKVD USSR) kaj gvidanto de la sovetia sekreta servo, kun la peto, esplori „tiun tre strangan kazon”. Respondon GD neniam ricevis.

Ĝenerale, virinoj ludis do gravan rolon en la vivo de GD. En la nokto de la Reichstag-incendio GD laŭdire veturis en trajna dormvagono kun sia (nekonata germana) amatino[30] de Svislando al Berlino,

---

[24] Vd. http://bg.wikipedia.org/wiki/Люба_Ивошевич.

[25] Laŭ Pavel Pisarev (en: http://pressadaily.bg/publication/11036-Павел-Писарев:-Жени-спасяват-Димитров-на-процеса-в-Лайпциг). Ankaŭ Dedijer menciis tiun ĉi epizodon en sia Tito-biografio, en kiu la nomo de GD aperis multfoje. Laŭ liaj indikoj la serbino nomiĝis Jovošević kaj saltis de la 3a etaĝo de la *hotelo Lux.*

[26] Laŭ Pisarev, kies edzino cetere estis la nepino de Vasil Kolarov.

[27] Laŭ http://cs.wikipedia.org/wiki/Georgi_Dimitrov#Rodina.

[28] Laŭ Pisarev.

[29] Vd. http://www.blitz.bg/article/26282. La plenan foton vd. duoble alklakante ĝin per la muso.

[30] Laŭ akad. Georgi Markov en http://www.trud.bg/Article.asp?ArticleId=640041.

tiel ke li havis alibion, kiun Roza kolportis al la tribunalo (ŝi mensoge diris al la tribunalo, ke ŝi estis kun li en la trajno). Virinoj ankaŭ alportis monon al la prizono Moabit, por ke la pasia fumanto GD povu aĉeti siajn cigaredojn.

Post sia reveno al Bulgario, GD adoptis la infanon Bojko, kiu fariĝos signifa bulgara diplomato kaj politikisto.[31] Bojko estis la filo de pereintaj partizanoj el Pleven, Kosta Zlatarev kaj Mara Denĉeva. Post la morto de GD Roza forlasis Bulgarion kaj iris kun Bojko al Moskvo, kie ŝi forpasis en 1958, kiam la infano vizitis la plej lastan klason de la gimnazio. Malmulte konata estas ankaŭ la historio, ke kiam Mitja ankoraŭ vivis, GD kaj Roza adoptis la filinon de la ĝenerala sekretario de la Ĉina KP, Wang Min, kiu estis nomata Fani kaj frue mortis (en 1974).[32]

Ljuba, Roza kaj Mitja estis enterigitaj en la Novodeviĉi-tombejo en Moskvo.

Kelkaj aliaj kromaj scioj pri GD estas dankindaj al Ruth von Mayenburg, kiu verkis la ege legindan memuarlibron *Hotel Lux* (1978, nova reeldono en 2011). La aŭtorino, kiu mem loĝis en tiu fifama moskva Komintern-hotelo inter 1938 kaj 1945 kaj kie ŝi konatiĝis kun la eminentuloj de la internacia komunisma movado, memoris pri GD kiel pri karaktere ege dura, sed helpema bolŝevika tipo, kiu estis tiam ornamata per longa nigra barbo kaj konsiderata kiel sufiĉe belaspekta kaj alloga viro (kies profundaj malhelaj okuloj plaĉis al la virinoj). GD faris lertan impreson kaj scipovis kelkajn lingvojn, kvankam li vizitis nur la bazan lernejon kaj estis simpla laboristo. Post kiam GD estis vokita el Bulgario al Moskvo, kie li karieris en EKKI, Vasil Kolarov havigis al li postenon en la Internacia Agrarinstituto. Tie GD vekis la atenton ĉe la kolegoj ĉefe pro siaj kaprica konduto kaj malkapablo submetiĝi al la burokratia aparato, krom pro sia prefero admiri la belajn virinojn anstataŭ la laboro mem. Pro tio li akiris la reputacion de sendisciplina kunlaboranto, se tio, kion Aino Kuusinen disrakontis pri li, estas trafa. Alia anekdoto: Kiam post la lepsika proceso GD alvenis Moskvon, inter la unuaj Lux-loĝuloj, kiujn li tie renkontis, estis la pola kamarado Henry Walecki (alias Maximilian Horowitz)[33]. GD tuj demandis lin: „Nu, ĉu mi bone kondutis? Sed kial GD demandis ĝuste lin? Ĉar li estis la aŭtoro de la libro *Kiel komunisto kondutas antaŭ la tribunalo?*, kiu estis tradukita al pluraj lingvoj. Walecki respondis: „Jes, Georgi, vi bone kondutis." Kiel von Mayenburg plu rakontis, ne ĉiuj Lux-anoj estis feliĉaj, ke GD estis absolvita kaj liberigita en Lepsiko. Precipe la germana komunista funkciulo Richard Gyptner, kiu loĝis en la kvina etaĝo kaj kiu evidente ial intrigis kontraŭ GD, klopodis pruvi al la gvidantoj de Komintern per dokumentoj, ke GD malrespektis la regulojn de la konspirado kaj ke pro lia kulpo la germana polico povis akiri kompromitan materialon el la Okcidenta Buroo (laŭ Herbert Wehner). Ŝajnas, ke Gyptner mem ne kredis, ke GD estos absolvita kaj liberigita, sed spekulativis, ke li estos likvidita de la germanoj.[34] Do, ĉi tiu amara epizodo ilustras, ke GD ne havis nur amikojn kaj admirantojn inter la komunistoj.

## *7. La rolo de GD ĉe la likvido de la nekomunisma bulgara elito post la 9a de septembro 1944.*

En majo 1944 evidentiĝis, ke la Ruĝa Armeo pli rapide atingos la Balkanon ol povis tion fari la britaj kaj usonaj soldatoj. Kiam en oktobro 1944 Churchill kaj Eden renkontiĝis kun Stalin kaj Molotov en Moskvo, oni diskutis pri la novaj influaj zonoj en sudorienta Eŭropo. Kun ilia interkonsento, la balkana

---

[31] Tuj post la fino de la gimazio Bojko ekvizitis la Moskvan Instituton por internaciaj rilatoj. 1964-66 li laboris ĉe la bulgara reprezentejo de UN, en 1967 li fariĝis membro de BKP, 1974-78 li laboris en la CK de BKP, 1978-82 li estis ambasadoro de Bulgario en Havano (Kubo), 1981 li fariĝis membro de la CK de BKP. Post la 17a de novembro 1989 li anstataŭigis la ministron Petâr Mladenov kaj ĝis septembro 1990 restis ministro pri eksteraj aferoj.
Vd. [http://bg.wikipedia.org/wiki/Бойко_Димитров_(политик)](http://bg.wikipedia.org/wiki/Бойко_Димитров_(политик)). La sama Bojko Dimitrov verkis la enkondukon al la oficiala bulgara eldono de la *Taglibro* de GD.

[32] Laŭ Lazar Velev.

[33] La gravaj loĝantoj de la hotelo Lux kutime estis registritaj sub falsa nomo.

[34] Gyptner estis inter la fondintoj de GKP en 1919 en Hamburgo. En 1929 li fariĝis la sekretario de GD. En 1933 li laboris en la Buroo de la Internacia Ruĝa Helpo de Willi Münzenberg en Parizo kiel reprezentanto de Komintern. En 1935 li iris al Sovetunio, kie li laboris kiel redaktoro ĉe la radiostacio Freies Deutschland. En aprilo li revenis al Germanio kun la „Grupo Ulbricht" kaj karieris en SED kaj GDR.

regiono devis esti dividita laŭ jenaj influaj zonoj: Sovetunio ricevu po 80 procentojn en Bulgario kaj Hungario, 90 procentojn en Rumanio kaj 60 procentojn en Jugoslavio, dum Britio ricevu 90 procentojn en Greklando. Tiu cinika fimarĉandaĉo, ĉe kiu Churchill kvazaŭ donacis Bulgarion al Stalin, estis granda triumfo por la sovetia diktatoro, kiu kaptis la okazon por submeti ĉiujn orienteŭropajn landojn al la sovetia influa zono kaj konstrui feran kurtenon kontraŭ okcidenta Eŭropo por forŝirmi la propran zonon disde la Okcidento. Sed kompreneble, la sorto de Bulgario estis decidita jam pli frue en Moskvo de Stalin, kiu utiligis sian lojalan bulgaran lakeon GD por siaj perfidaj planoj. Jam ekde la fino de 1941 GD alvokis la bulgarajn komunistojn tra la gazeto *Pravda* „liberigi Bulgarion de la germanaj faŝistoj kun la armilo en la mano", t.e. klopodi forigi la reĝimon de caro Boris III. La 24an de julio la politburoo de BKP decidis la armitan batalon kontraŭ la germanoj, du tagojn poste ekformiĝis la bulgaraj partizanoj, kiujn GD same devis organizi. Sed la potenca Kamparana Unuiĝo bremsis tiujn klopodojn en Bulgario. En septembro 1943 la koaliciaj partneroj de la komunistoj fondis la "Patrolandan Fronton".

La 23an de aŭgusto 1944 la Ruĝa Armeo atingis la Danubon, kie troviĝas la limo inter Rumanio kaj Bulgario. La rapide transformita bulgara registaro de Muraviev panike klopodis eviti la sovetian okupon de Bulgario kaj nuligis la aliancon kun Germanio. Sed tio jam estis tro malfrua. Intertempe, ankaŭ la bulgaraj partizanoj komencis ekagi. GD postulis de la bulgaroj stari flanke de la Ruĝa Armeo por liberigi Bulgarion de la germana jugo. Kiam la 5an de septembro la sovetia registaro proklamis la militon kontraŭ Bulgario, ĝi sendis siajn soldatojn rekte sur la teritorion de Bulgario, sen renkonti konsiderindan kontraŭstaron. La 9an de septembro la registaro de Muraviev estis forigita kaj ĝiaj anoj arestitaj de puĉistoj konsistantaj el partizanoj, armeanoj kaj ribeluloj, kiuj okupis la ministeriojn kaj ŝtatajn instancojn. Iu "Nacia komitato de la Patrolanda Fronto" (gvidata de Georgiev, Stajnov, Velĉev, Nejĉev, Tanev, Stojanov, k.a.) transprenis la regopovon ankoraŭ en la sama tago. Laŭ la oficiala komunisma historiografio*, kiu liveris al la popolo sian propran version kaj interpreton de la eventoj, ĉi tiu dato estis 'kanonizita' kiel la tago de la "ribelo de la kontraŭ-faŝismaj fortoj". Laŭ la oficiala dikcio, aŭ ĵargono de la manipulata bulgara komunisma historiografio*, en la 9a de septembro 1944 "la popolo" forigis en Bulgario la "monarki-faŝisman diktaturon" kaj „transprenis la povon per armata ribelo". Laŭ la oficiala priskribo, la sovetia armeo, la forigo de la Muraviev-registaro kaj la formado de la "Patrolanda Fronto" estis bonvenigataj kun grandega entuziasmo kaj ĝojo flanke de la bulgara popolo.

Post tio, Bulgario aktive partoprenis en la milito kontraŭ Germanio kaj forpelis la germanojn el la lando. En tio gravan rolon ludis ankaŭ la partizana brigado ´Georgi Dimitrov´. En tiu kruela "Patrolanda Milito", kiu etendiĝis ĝis Hungario, laŭ la oficiala historiografio* 31'000 bulgaroj perdis sian vivon. La plej granda honto por Bulgario estis, laŭ la komunisma historiografio*, ke ĝi alianciĝis kun la Hitler-faŝistoj, do la lando iel devis restarigi sian perditan honoron. La propagando skribis ankaŭ, ke tio ne estis malfacila tasko, ĉar la bulgara popolo „profunde malamis la nacisocialismajn konkerantojn". Ĉi tio ankaŭ malhelpis, ke la intermilita tempo de la bulgara carismo ne povis esti objektive traktata de la bulgara historiografio. La germandevenaj caroj oficiale restis konsiderataj kiel fipersonoj, kiuj estis proklamitaj kiel nedezirataj fremdaj elementoj en la bulgara historio, kiuj subpremis la komunistojn kaj kiuj kaŭzis grandan malfeliĉon al la lando kaj popolo. Tiu ĉi unuflanke negativa bildo pri la carismo flanke de la komunistoj kaŭzis, ke multaj generacioj de bulgaroj ricevis, povis ricevi dum la komunisma tempo neobjektivan, torditan kaj konfuzan bildon pri tiu parto de sia historio, kiu malaperis en la nebulo de la antaŭkomunisma tempo, kiun memoris (parte kun nostalgio) nur la maljunuloj.[35]

---

[35] La polemiko de la bulgara komunisma historiografio estis lanĉita jam kontraŭ princo Aleksandro I. Battenberg, kiu estis prezentata de la bulgara komunisma historiografio kiel „konvinkita konservema reakciulo" kaj profunda malamiko de la rusa caro Aleksandro II., kies nevo li estis. La dankemo de la bulgaroj, inkluzive de la komunistoj, al Ruslando, pro ĝia dufoja helpo liberigi la landon de fremdaj regantoj, konis neniujn limojn kaj fariĝis parto de la nekritikebla bulgara mitologio, al kiu apartenas ankaŭ la 9a de septembro 1944, kiam la Ruĝa Armeo liberigis Bulgarion de la germanoj kaj de la hejma „monarkia faŝismo". Finfine, Aleksandro, kiu perdis ankaŭ la fidon de la rusa caro, estis arestita de „rusofilaj" politikaj fortoj kaj forpelita de la lando. Ne pli favoran pritakson la bulgara komunisma historiografio trovis pri lia posteulo Ferdinand de Coburg-Gotha, kiu estis karakterizita kiel „potencavida, senkontrola kaj aventurema" reganto, kiu toleris registaron (Stambolov), kiu aplikis „plej brutalan polican teroron" kaj persekutis la socialistojn kaj kiu kaŭzis al la bulgara popolo „multan malbonon kaj suferadon", akcelante la kapitalismon kaj la ekspluatadon de la laboristoj. „Kiel agento de la aŭstra-hungara kaj germana imperiismoj li estis piliero de la plej reakciaj cirkloj de la bulgara burĝismo kaj kaŭzis al la lando unu katastrofon post la alia." La sola pozitiva merito, kiun la komunistoj vidis ĉe Ferdinand, estis, ke li klopodis plibonigi la rilatojn kun Ruslando kaj atingis la sendependecon de Bulgario en 1908, sed ŝajne nur por esti agnoskita kiel ŝtatestro (caro) de Bulgario. Do, malgraŭ iuj meritoj, Ferdinand estis pritaksita kiel agresema kaj militema reganto kun paranojaj trajtoj, kiu kondukis sian landon en militajn

Tuj post la formado de la registaro de la “Patrolanda Fronto”, la komunistoj lanĉis, kun la helpo de popolaj milicoj kaj la komunisma ŝtata sekureco, brutalan kampanjon kontraŭ la t.n. “popolaj malamikoj” kaj “faŝistoj”. Koncernitaj de tiuj senkompataj persekutoj estis unuavice homoj, kiuj kunlaboris kun la malnova reĝa (cara) reĝimo; ĉi tiuj homgrupoj estis krude misfamigataj de la komunistoj kiel “monarki-faŝistoj”, “reakciaj perfiduloj”, “krimuloj-murdistoj“ kaj “fremdaj parazitoj” por ricevi de la komunistoj la traktadon, kiun tiuj konsideris adekvata por ili.

Konkretajn faktojn kaj ciferojn rilate al la persekutado kaj likvido de tiuj “popolaj malamikoj” en tiu periodo la bulgara publiko eksciis nur post la 10a de novembro 1989, kiam la komunismo en Bulgario estis finita kaj abolita. Tiam estis ankaŭ publikigita tuta aro da interesaj materialoj lige kun tiuj eventoj, ekzemple iuj telegramoj, kiujn GD ŝajne sendis el Moskvo al Bulgario kaj kiujn li ricevis el Bulgario. Tiel oni eksciis, ke la centran rolon en la efektivigado de la persekutado kaj likvido de “popolaj malamikoj” en Bulgario ludis Komintern kaj ties ĉeffunkciulo GD mem, nature kun la ‘aŭspicio’ de Stalin (kaj Berija) persone. Tiuj telegramoj montras, ke la brutaleco estis absoluta kaj totala kaj la toleremo kontraŭ la kunlaborantoj de la malnova reĝa reĝimo kvazaŭ nula. Ankaŭ la enorma rapideco de la purigado de “popolaj malamikoj” eĉ superis la teroron en aliaj komunismaj landoj. En tiuj telegramoj (kiuj estis skribitaj en la rusa lingvo – restas la demando ĉu GD mem aŭtoris kaj sendis ilin aŭ ĉu iu faris tion por li) GD postulis de la komunistoj en Bulgario, ke *„neniu estu indulgita”* (21a de decembro 1944) kaj ke *„konsideroj pri homeco kaj kompato ne devos ludi ian rolon”* ĉe la traktado de tiuj “popolaj malamikoj” (januaro 1945). Postulita estis la starigo de “popolaj tribunaloj”, en kiuj la “popolaj malamikoj” estu prijuĝataj kaj adekvate kondamnitaj post ilia aresto. En telegramo de la CK de la BKP de la 13a de septembro 1944 la instalado de la postulataj “popoltribunaloj” kontraŭ “faŝismaj krimoj” por “finkalkuli” kun la “malicaj malamikoj” estis konfirmita kaj la ´laboro´ povis esti komencata. La instrukcioj kaj ordonoj el Moskvo estis senprokraste plenumataj en Bulgario.

Surbaze de la sciigoj, kiujn li ricevis de iu Ivan Karaivanov, malnova bulgara revoluciulo kaj iama Komintern-kunlaboranto, Vladimir Dedijer venis al la konkludo, ke GD pli kaj pli fariĝis nura pajlohomo de Stalin, post kiam li perdis sian influon, por efektivigi ĉiujn ordonojn de la moskva diktatoro laŭ ´kadavra obeado´.[36]

Ankaŭ en sia Taglibro GD notis la neceson de la starigo de popolaj tribunaloj. La 11an de septembro 1944 li eĉ memorfiksis la koncernan tekston de la telegramo, kiun li sendis de Moskvo al la CK de BKP. Tie li skribis i.a. jenon: „Oni devas atingi la starigon de popolaj tribunaloj por rigardi la aferojn de la perfiduloj, faŝistaj krimuloj kaj ilia punado. Prenu rapidajn rimedojn por la starigo de demokratia ordo en la lando kaj de la disciplino kontraŭ la provokistoj kaj sabotistoj. Konsideru, ke la faŝista reakcio ankoraŭ ne estas disbatita, kaj ke en Balkano ankoraŭ estas germanoj. (…).“ Estas malfacile imageble kiel kongruigi la brutalan persekutadon de homoj kun la demokratio !

Laŭ la publikigitaj fontoj, la “popolaj tribunaloj” funkciis inter decembro 1944 kaj aprilo 1945 kaj ampleksis 68 juĝistajn kolegiojn. En tiu periodo estis aranĝitaj 135 amasprocesoj en la tuta lando. Arestitaj estis entute 28’630 personoj. Evidentiĝis, ke la ĉefa celpubliko de la juraj persekutoj fare de tiuj “popolaj tribunaloj” koncernis membrojn de la regantoj de la tempo inter 1941 kaj 1944, kiuj estis konsiderataj kiel “militkrimuloj”, kaj personojn, pri kiuj oni supozis, ke ili povus malhelpi la “konstruadon de la socialismo”, t.e. la sovetiigon de la lando kaj la firmigon de la regado de la komunistoj. Kiu tiam ne sukcesis fuĝi eksterlanden, tiu devis enkalkuli la riskon esti arestita aŭ mortigita. De 11'122 arestitaj personoj, kiuj estis akuzitaj, nur ĉirkaŭ 2000 estis absolvitaj kaj liberigitaj, dum en 9155 kazoj juĝo estis esprimita. 2730 personoj estis mort-kondamnitaj kaj 1305 personoj ricevis dumvivan punon en malliberejo. Laŭ alia fonto, sub la gvido de ministro Terpeŝev funkciis specialaj “popolaj kortumoj”, kiuj prononcis mort-kondamnojn kontraŭ 2138 generaloj kaj oficiroj (47 estis ekzekutitaj) kaj iamaj registaraj membroj. La 1an de februaro 1945 la popolaj tribunaloj mort-kondamnis grandan parton de la politika, armea kaj intelekta elito de la lando, kiu ankoraŭ travivis la teroron de la jaro 1944. La mortpunoj estis efektivigitaj en la nokto al la 2a de februaro. Inter la viktimoj troviĝis 3 iamaj anoj de la reganta familio (kiel Kiril), 22 ministroj (kiel Jugov, ministro pri internaj

aventurojn, kiujn li ne povis gajni. La reĝimo de lia posteulo Boris III., precipe de la ĉefminisrtoj Cankov kaj Ljapĉev, sub kiuj okazis drasta persekutado de la komunistoj, estis diabligita de la bulgara komunisma historiografio kun blinda malamo kiel „monarkia faŝismo“ k.s. En la postkomunisma Bulgario, la bulgaraj caroj, kiuj regis Bulgarion inter 1879 kaj 1946, oficiale estis politike rehabilititaj.

[36] V. Dedijer: Stalins verlorene Schlacht, Wien 1970, p. 49.

aferoj), 67 parlamentaj deputitoj, 47 generaloj kaj altrangaj oficiroj kaj aliaj personoj.[37] La iamaj ĉefministroj de la milita tempo (Filov, Miĥov, Boĵilov kaj Bagrjanov) estis mort-kondamnitaj kaj tuj ekzekutitaj. La iama ĉefministro Muraviev estis sendita al la malliberejo, kie li devis resti ĝis 1955 (la postan jaron li estis denove arestita kaj sendita al Belene, kie li restis ĝis 1961).[38] Inter la viktimoj troviĝis ankaŭ aro da ŝtataj kaj registaraj sekretarioj, policanoj, juĝistoj, ekleziuloj, eldonistoj kaj ĵurnalistoj de grandaj gazetoj kaj revuoj kaj multaj intelektuloj. Purigitaj estis aparte la ministerioj pri internaj aferoj, justico kaj klerigo. Aliaj politikistoj kiel Muŝanov de la Demokratia Partio, kiu rifuzis kunlabori kun la komunistoj, malaperis en la koncentrejo. La aperantaj vakuoj rapide povis esti replenigitaj per komunistoj. La likviditaj "faŝismaj reakciuloj" kaj "popolaj malamikoj" estis anstataŭigitaj per politikaj rifuĝintoj, oficiroj, kiuj havis meritojn por la kontraŭfaŝisma rezisto, kaj de iamaj ĉefpartizanoj, kiuj revenis el Sovetunio al Bulgario. Laŭ la opinio de atestantoj, observantoj kaj fakuloj, la bulgaraj komunismaj purigoj koncernis inter 30'000 kaj 40'000 personojn precipe inter lokaj honoroficuloj, urbestroj, instruistoj, ekleziuloj kaj "burĝaj" komercistoj. La ekzaktaj ciferoj ne estas konataj, kaj ankaŭ la sorto de multaj aliaj viktimoj ne estas klara.

Kelkmil personoj estis senditaj al la koncentrejoj, kiuj estis starigataj fine de 1944 laŭ la dekretoj subskribitaj de la komunismaj ministroj. Ĉi tiu bulgara gulago formis la integran parton de la komunisma subprema aparato en Bulgario. La plej fifamaj inter tiuj teruraj malliberejoj estis la koncentrejo "S", kiu ekzistis inter 1947 kaj 1949; aliaj koncentrejoj, lagroj kaj prizonoj kun gulaga karaktero troviĝis en Kucijan/Bobovdol, Belene, Skravena (por virinoj), Gazdov, Cogov, Raĵdeva kaj Loveĉ. Teruraj prizonoj ekzistis ankaŭ en Varna, Dobriĉ, Veliko Târnovo, Pleven, Dolni, Dabnik, Milkovica, Pernik, Sliven, Karlovo (kie troviĝis ankaŭ kelkaj bulgaraj esperantistoj). Oficiale, Belene estis fermita kiel koncentrejo en 1962, sed ĝi daŭre servis kiel malliberejo, ekzemple por bulgaraj turkoj, ĝis 1989. Laŭ iuj aŭtoroj (kiel Ivan Nikolov), en tiujn koncentrejojn kaj prizonojn estis deportitaj ĉirkaŭ 60'000 personoj, kaj laŭ la indikoj de Fanna Kolarova, inter 1944 kaj 1962 en tiaj lokoj troviĝis ĉirkaŭ 250'000 homoj. Grandkvante la komunistoj konfiskis la privatan posedon de la viktimoj kaj kolektivigis la agrikulturon. Ne estas mirige, ke post 1989 estis trovitaj ne malmultaj amastombejoj en Bulgario.

## *8. La rolo de la komunistoj ĉe la likvido de la parlamenta opozicio en kaj post 1945.*

Kiam la komunistoj transprenis la povon en Bulgario, la maldekstraj partioj tute ne estis popularaj en la lando, tiel ke la socialismo devis esti perforte altrudata de la komunistoj al la bulgara popolo per ruza politika strategio, kiu antaŭvidis unue koalicion kun nekomunismaj partioj kaj poste la iompostioman eliminon de la "kontraŭ-revoluciaj" opoziciaj burĝaj fortoj, kiuj estis diskredititaj pro la kunlaboro kun la carismo, la faŝistoj kaj la okcidentaj potencoj. Tiel la demokratio estis abolita, kvankam la komunistoj konstante parolis pri "popoldemokratia", kiu estis starigita aŭ starigota de ili. Tiu procezo postlasis ŝajnkoalicion de la komunistoj kun oportunistoj kaj profituloj. Post kiam la komunistoj elŝaltis la kontraŭulojn en la propraj vicoj, ili komencis forigi la opoziciajn politikistojn ekster la Patrolanda Fronto – en tio ili estis helpataj de la sovetia armeo kaj sekreta servo. Ĉar li nenion videblan entreprenis kontraŭ la lezado de la demokratiaj kaj homaj rajtoj, GD probable, silente aprobis, toleris kaj apogis ĉiujn tiujn farojn kaj krimojn. Tiel, la unua viktimo de tiu egalŝalta politiko fariĝis d-ro Georgi Miĥov Dimitrov (nomata Gemeto, 1903-72), al kiu la hazardo donis la saman nomon kiel al la komunisto GD.[39] Post sia reveno al Bulgario, el kiu li fuĝis dum la milita tempo, li komencis kontraŭbatali la kreskantan politikan influon de la komunistoj. Kiam en oktobro 1944 li fariĝis ĝenerala sekretario de la Kamparana

[37] Povas esti, ke en diversaj fontoj aperas diversaj ciferoj, tiel ke la tuta bildo povas esti iom konfuza. Mi ne havis ĉi tie la ambicion detale prezenti la disvolviĝon de la unuopaj procesoj, sed menciis nur la esencajn faktojn. Detalojn pri ciferoj kaj tribunalaj konsistoj vd. http://bg.wikipedia.org/wiki/Народен_съд kaj http://www.bulgaria1944-1989.eu/media/Bulgarien1944-1989.pdf, p. 27.

[38] En 1963 Muraviev publikigis libron kun la titolo *Събития и хора* (Eventoj kaj homoj). Li forpasis en 1965 en Sofio, kaj la verdikto kontraŭ li estis nuligita nur en 1996.

[39] Ekzistis ankoraŭ tria famulo kun la nomo Dimitrov, nome Stanke Dimitrov, nomata Marek (1889-1944). Li estis bulgara antifaŝisto, altranga funkciulo de BKP kaj kunlaboranto de GD. Li estis intime ligata kun la atenco kontraŭ la katedralo Sv. Nedelja en 1925. 1948-92 la urbo Dupnica estis nomata laŭ lia nomo.

Unuiĝo, li klopodis establi sian partion kiel opozician forton kaj tiel fariĝis konkurencano por la komunistoj. Pro tio Gemeto fariĝis aparte danĝera politikisto por la "popoldemokratia povo" kaj la Patrolanda Fronto, kiu konsideris lin malamiko kaj kalumniis lin kiel "agenton de Usono", kiun la komunistoj kulpigis, ke ĝi celas saboti la balotojn. Kiam la premo kontraŭ Gemeto fariĝis tro granda, li rezignis pri sia politika ofico. Tra la usona ambasadejo li forlasis Bulgarion kaj fuĝis al eksterlando. Alia grava politikisto, Nikola Petkov, la gvidanto de la Pladne-grupo kaj oficanta vicĉefministro, estis tro memstara por la gusto de la komunistoj. Laŭ tradicia sukcesa modelo, la komunistoj intrigis kontraŭ li en la vicoj de la Pladne-grupo por atingi, ke kelkaj kunbatalantoj de Petkov distanciĝu de li. En julio 1945 li estis devigita forlasi siajn registarajn oficojn. Per la sama metodo ankaŭ la socialdemokratoj estis malfortigataj kaj ilia gvidanto, Grigor Ĉeŝmedĵiev, estis kondukita al la demisio de siaj funkcioj. Poste, ankaŭ la milita ministro Damjan Velĉev, unu el la gvidantoj de la Zveno-grupo, kiu formale kontrolis la bulgaran armeon, devis forlasi sian postenon kaj estis anstataŭigita per la komunisto Georgi Damjanov.

La balotoj de la 8a de septembro 1946 rezultis nur kvar procentojn favore al la konservado de la monarkio, kaj restis duboj ĉu tiu plebiscito konformis al demokratiaj kriterioj kaj normoj; aliflanke, ŝajnis, ke la rezulto en principo pli malpli kongruis kun la ĝenerala etoso en la popolo. La 15an de septembro estis proklamita la Bulgara Popola Respubliko, kaj la malnova komunisto Vasil Kolarov, kiu revenis el Moskvo al Sofio, fariĝis la provizora ŝtatestro. La kronprinco Simeon, kiu tiam havis nur naŭ jarojn kaj kies patro Boris mortis en 1943, fuĝis al eksterlando, kie troviĝis lia patrino. En oktobro 1946 la parlamento estis dissolvita. Okaze de la balotado de la 18a de novembro kaj malgraŭ fortaj malavantaĝoj en la ludreguloj por la opoziciaj partioj, ili povis kune gajni ĉirkaŭ 25 procentojn de la voĉoj por si mem. Tio nature tute ne plaĉis al la komunistoj, kiuj volis regi mem. GD, kiu kandidatis pinte de la unueca listo de la Patrolanda Fronto, fariĝis nova ĉefministro. Sed Nikola Petkov riproĉis al la komunistoj, ke ili falsis kaj manipulis la balotojn. Ankaŭ la usona observanto grumblis pro la evidenta malobservo de la demokratiaj reguloj. La komunistoj reagis per venĝa sinteno kaj nur ĝisatendis la taŭgan momenton, kiam ili povos transpreni la tutan povon kaj komplete elŝalti la opozicion. Ĉi tiu momento alvenis post la fino de la packontrakto, kiu estis subskribita la 10an de februaro 1947 en Parizo. Unu tagon post la ratifado de la kontrakto far Usono la 4an de junio, la komunistoj arestis la konkurenton Nikola Petkov kaj akuzigis lin pro ŝtatperfido. La materialo, kiu devis pruvi lian 'krimon', estis falsita. Speciale organizita farsproceso kontraŭ la populara politikisto havis la celon timigi la opozicion kaj rompi la restantan kontraŭstaron de la opoziciaj fortoj. Kelkajn tagojn post kiam la packontrakto ekvalidis, Petkov estis kondamnita kaj ricevis la mortpunon. Malgraŭ la internacia protesto de la okcidentaj aliancanoj, la verdikto estis efektivigita la 23an de septembro, certe sen la malhelpo de GD. La 4an de decembro 1947 la bulgara parlamento alprenis novan konstitucion, kiu anstataŭigis la liberalan 'Konstitucion de Târnovo' de 1879. La nova bulgara konstitucio estis kvazaŭ kopio de la 'Stalina Konstitucio' de 1936, en kiu la disdivido de la povoj estis abolita. Formale, la tutan povon posedis la parlamento, sed la efektiva povo estis uzurpata de 9-persona prezidio, kies prezidanto estis samtempe la ŝtatestro. La prezidio nomumis la registaron, la superajn juĝistojn kaj la ĝeneralan prokuroron, diktis la ekonomian programon kaj povis ŝanĝi la konstitucion. La parlamento povis, aŭ devis, beni la decidojn de la prezidio. La gvida politika forto malantaŭ ĉiuj tiuj faroj kaj instancoj estis la Komunisma Partio, kiu mem elektis la regantojn de la ŝtato. Eĉ ene de la komunisma mondo tiu nova bulgara konstituacio estis aparte kruda kazo, se temas pri la abolo de la demokratia juro kaj la forigo de la civitanaj rajtoj. Formale, la nova konstitucio garantiis la egalecon de la civitanoj antaŭ la leĝo, sekurigis la konservadon de civitanaj rajtoj kiel la libereco de la opinio, gazetaro kaj kunvenado kaj promesis laborlokon por ĉiu bulgaro. Sed la klaŭzo, ke tiuj liberecoj ne povis esti utiligataj kontraŭ la ŝtato, malfermis al la diktaturo kaj arbitro ĉiujn pordojn. De la komunistoj tiu diktaturo estis 'vendata' kaj propagandata kiel "popoldemokratio" kaj progresema formo kompare kun la "putra kapitalismo". Malgraŭ eventualaj duboj, multaj bulgaroj, kiuj ankoraŭ memoris la malfacilan tempon de la monda ekonomia krizo de la fino de la 20aj jaroj, bonvenigis tiun novan socian ŝajn-sekurecon, kiun tiu diktaturo, enkondukita en Bulgarion kun la helpo kaj beno de GD, ebligis, kiel progreson.

En la venontaj monatoj la komunistoj komencis egalŝaltadi la koaliciajn partnerojn, kiuj restis en la Patrolanda Fronto. La partioj ekster ĝi estis malfondigitaj kaj la plimulto de la deputitoj arestigitaj kaj forigitaj. Ankaŭ la gvidanto de la sendependa socialdemokratio, Kosta Lulĉev, estis akuzita antaŭ la tribunalo kaj kondamnita, en novembro 1948, pro konspirado, al 15 jaroj da prizona aresto. La aliaj socialdemokratoj, kiuj restis en la Patrolanda Fronto, estis kunfanditaj kun la komunisma partio. La nova estro de la Kamparana Unuiĝo, Georgi Trajkov, agnoskis la "gvidan rolon de la laborista klaso kaj de la

komunisma partio”. En decembro 1948, dum la Va Kongreso de BKP, la “venko de la popolo sub la gvido de la partio” povis esti proklamita de GD,[40] kio signifis, ke en Bulgario la stalinisma sistemo povis esti fidele kopiata kaj enkondukata, kun ĉiuj fatalaj konsekvencoj, kiujn tiu sistemo havis por la lando, la popolo, la ekonomio kaj la libereco. Iu memstara bulgara vojo al la socialismo, pri kiu GD eble revis, estis malhelpata kaj malpermesata dekomence. Laŭ la nova sistemo do ne regis la plurisma demokratio, sed la t.n. “demokratia centrismo”, en kiu la komunistoj decidis mem ĉiujn demandojn kaj trudis ĉiujn solvojn pri personoj kaj programoj. De la oficiala propagando ĉio tio estis ‘vendata’ kiel “venko de la popoldemokratio kaj de la socialismo en Bulgario”. En principo la popolo rajtis nur konsenti kaj konfirmi. Ĉia kontraŭstro kaj kritiko kontraŭ la valida komunisma linio estis sufokata, ĉia protesto malhelpata, ĉia ideologia deviacio severe punita. Kadre de diversaj purigoj, ĝis la fino de la 40aj jaroj BKP ekskludis unu kvaronon de la membraro, kiu konsistigis la partion ekde 1944. La plimulto de tiuj eksigitaj membroj devis timi seriozajn personajn malavantaĝojn, ĉar ilin trafis la stigmo de “malamikoj de la partio kaj perfiduloj de la popolo”, de “etburĝaj” aŭ “nematuraj elementoj”. Je la fino okazis tiel, ke la ŝtato estis regata ne de la laborista klaso, kiel la komunisma propagando asertis, sed de malgranda privilegiata bando aŭ koterio de lojalaj komunistoj, kiuj formis la novtipan “partian ŝtaton” kun ties specifa nomenklaturo, kies ĉefo estis samtempe la partiestro kaj la ŝtatestro, kiu ne estis kritikebla (krom se la politika kurso ŝanĝiĝis kaj la koncerna gvidanto fariĝis persona non grata).

En la oficiala kaj esperantigita GD-biografio de Petra Radenkova (1982) la koncernaj frazoj kaj klarigoj pri la tujaj postmilitaj balotoj en Bulgario kaj la likvido de la bulgara nekomunisma opozicio, kiu ilin akompanis, sonis tiel: „En la somero de 1945 en Bulgario komenciĝas balot-kampanjo por la Parlamento. Samtempe en la partioj konsistigantaj la Patrolandan Fronton okazas komplikaj procesoj akompanataj de formiĝo de opoziciaj grupiĝoj. G. Dimitrov malkaŝas la socialan naturon de la opozicio, ĝiajn ligojn kun la dekstraj elementoj troviĝantaj en la Patrolanda Fronto. *Li karakterizas kun ĝusta intuicio la taktikon de la partio rilate al la formiĝanta opozicio.* (...) Dimitrov revenas Bulgarion en momento, kiam la preparlaboro por la parlamentaj balotoj atingas sian kulminon. La opozicio penegas altiri la laborulojn el urboj kaj vilaĝoj. Ĝi spekulativas pri la ekonomiaj embarasoj kaj la ne-reguligita internacia pozicio de la lando. La apero de tia aŭtoritato kia Dimitrov sur la enlanda politika scenejo havas grandan signifon por la fina rezulto de la balotbatalo. (...) La kampanjo por referendumo kaj balotoj por la Konstituanta Parlamento estas akompanata de *akra batalo kontraŭ la opoziciaj fortoj.* (...) La aplikataj rimedoj limigas, sed ne ĉesigas la *kontraŭrevolucian furiozadon de la opozicio.* (...)“ La frazoj kursivigitaj de mi parolas por si mem kaj emfazas la laŭdirajn mistrajtojn de la politika opozicio, la negativan sintenon de la komunistoj pri ĝi kaj diktas la metodojn, kiuj estas aplikendaj kaj pravigeblaj por kontraŭbatali ĝin (same en la suba citaĵo). La epizodo pri la finiĝo de la opozicio kaj de la opoziciuloj Gemeto kaj Petkov estis prisilentita en tiu konciza primitiva biografio, kies legantoj ne devis koni la gravajn detalojn pri la malbelaj praktikoj de la politiko de la bulgaraj komunistoj kaj de la duonsankta Patrolanda Fronto, kiu mem glitis sub la plenan kontrolon de BKP.

En la raporto al la CK de BKP de la 19a de decembro 1948 al la 5a Partia Konferenco, kiu evidente estis verkita de GD mem, oni legas pri la opozicio jenon: „Malgraŭ la aktiva rezistado de la opozicio la packontrakto estis subskribita. La diplomatiaj rilatoj kun Anglio kaj Usono estis restarigitaj. La ampleksa klariga laboro, kiun la partio kaj la Patrolanda Fronto efektivigis inter la kamparanoj kaj urbanoj, kiuj estis portempe kondukataj sur la *eraran vojon de la opozicio,* kaŭzis la plenan izoliĝon de la *kontraŭpopola opozicio. La gvidantoj de la opozicio, izolitaj kaj malestimataj de la popolo,* serĉis eliran vojon el *la organizado de konspiroj kun la celo perforte forigi la popolan registaron kun la subteno de ekstere,* kio poste kondukis al la *kompleta ekstermo* de la organizaĵo de Nikola Petkov, kiu kaŝis sin kiel Kamparanan Unuiĝon. Sub la gvido de nia partio vico de *reakciaj konspiroj* estis malkaŝitaj kaj sufokitaj per la *malmola mano, komploto* de la partiano Damjan Velĉev estis *malkaŝita kaj likvidita,* la armeo estis *konsekvence purigata de reakciaj oficiroj.* Nia partio efektivigis la *lukton kontraŭ la opozicio,* kiu strebis restaŭri la malnovan ordon, ĝis la fino (…); *la perfidon, kiun la gvidantoj de la opozicio kiel agentoj de la eksterlando* faris al la nacio, ĝi plene malkaŝis. Tio estis *akra klasbatalo. La malamikoj de la laborista klaso estis ankaŭ la malamikoj de la nacio.* (…)“ Tio estis la

[40] La teksto de la raporto estas publikigita en la Verkaro de GD (eld. BKP, vol. 14, 1955; eld. Sofia-Press/Dietz 1976, vol. 3). Filmon vd. sur http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=OPpvLX6ZrPk. GD, kiu devenis el okcidenta Bulgario, parolis la okcidentan varianton de la bulgara lingvo (ekz. golema anst. goljama, teĥno anst. tjaĥno, ktp.).

tiama oficiala stilo, dikcio aŭ sinteno koncerne la opozicion. Ŝajnas al mi, ke tiuj mallongaj tekstopecoj sufiĉas por doni ekzemplon pri la etoso, kiu tiam regis en Bulgario rilate al la opozicio kaj pri la pensmaniero de GD, kiu havis la taskon disbati tiun opozicion, kiun la komunistoj diskreditis kaj misfamigis kiel "reakcian, eraran, malestimatan" ktp. kaj gvidatan de "kontraŭpopolaj", "konspiraj" kaj "perfidaj" fortoj. Tiel, pluraj generacioj de bulgaroj ricevis ne nur torditajn informojn pri la historio ĝenerale, sed ankaŭ manipulitan kaj falsan bildon pri politiko, kapitalismo kaj socialismo/komunismo kaj pri la rolo de la politika opozicio, kiun ĝi devus ludi en la (vera) demokratio. Estas tute klare kaj kompreneble, ke sub tiaj kondiĉoj la bulgaroj neniam povis krei kaj evoluigi normalan kaj sanan rilaton al la politika opozicio kaj al la politiko entute, fakte ĝis hodiaŭ.

## *9. La rilatoj inter GD/la bulgaroj kaj Stalin*

Tiu ĉi temo estas sendube tre interesa, kaj en la unuopaj ĉapitroj de ĉi tiu studo diversaj aludoj jam estis faritaj, kiuj permesas fari provizorajn konkludojn pri la etoso, kiuj karakterizis la rilatojn inter GD, la bulgarojn kaj Stalin. Ĉu temis nur pri miskomprenoj inter homoj, aŭ ĉu Stalin intence traktaĉis aliajn komunismajn gvidantojn, precipe la bulgarojn, kiel stultulojn, maltaŭgulojn kaj ´subulaĉojn´, por altrudi al ili sian volon, ne estas tute klare. Aldone al la jam menciitaj detaloj mi trovis ankoraŭ du konsiderindajn atestojn pri ĉi tiu sinteno de Stalin en la libro de Vladimir Dedijer, kiu aperis originale en la angla lingvo sub la titolo *The Battle Stalin Lost*, kiu estis eldonita en 1970 en la novjorka eldonejo The Viking Press. Samjare, tiuj memoroj de la jugoslavia ĵurnalisto, kiuj ampleksas la jarojn 1948-53, aperis en la germana lingvo en la viena Europa Verlag. La teksto estis unuafoje publikigita en la slovena gazeto *Delo*. GD estas menciita plurfoje, en diversaj kuntekstoj. En ĉi tiu libro Dedijer citis leteron de Moŝa Pijade, en kiu li rakontis pri iu renkontiĝo inter Stalin kaj la jugoslaviaj kaj bulgaraj delegacioj en januaro 1945. Dum la koncerna vespermanĝo Stalin faris iujn duonseriozajn ŝercojn (kiel kutime kun provokaj aludoj) kaj riproĉis al la bulgaroj, ke ili ŝtelis sian bulgaran brandon en Jugoslavio. Jugov, kiu ĉeestis la kunvenon, ne trovis tiun ŝercon gaja kaj evidente estis ofendita. Poste Stalin daŭrigis la ´ŝercadon´ kun GD, dirante, ke estus bone, se la bulgara parlamento (sobranje) elektus kelkajn opoziciulojn, kaj se oni tiajn ne trovus, tiam oni almenaŭ havu dudekon da faŝistoj je la dispono. Stalin ripetis tri foje tiun ´sercon´, kaj GD donis iun embarasan respondon en tiu senco, ke la Patrolanda Fronto eble kunsidos por veni al la konkludo, ke tia opozicio estas necesa. Ĉar Moŝa Pijade mem ankaŭ iom strange reagis per embarasa rideto, Stalin rimarkis lin kaj subite diris al GD: "Vi nenion komprenas, rigardu tiun ĉi, li komprenas gin", fingromontrante al Pijade. Kun ruĝa vizaĝo GD turnis sin al Pijade kaj perplekse rigardis lin, kaj ambaŭ komprenis la abomenan karakteron de Stalin. Pijade sentis sin ŝokita, ĉar li ne atendis, ke Stalin tiom aĉe traktas sian bulgaran kamaradon. Stalin kutimis tute arbitre montri sian altegan estimon, jen foje al Tito, jen foje al Hebrang, jen foje al iu alia. La bulgarojn li kredeble malrespektis, aŭ kredis ke eblas malrespekt ilin. Ankaŭ la maljunulo Kolarov estis krude traktita de Stalin en tiu renkontiĝo. Kiam Kolarov anoncis, ke li deziras reveturi al Bulgario, Stalin respondaĉis laŭte kaj krude: "Vi iros kiam oni diros tion al vi, por la momento vi forgesu tiun ideon." Simile kruda konversacio inter Stalin kaj GD ripetigis kelkajn jarojn poste, kiel mi montros en la venonta ĉapitro.

Duan similan anekdoton Dedijer rakontis en sia biografio pri Tio, lige kun la preparado de la fondo de Kominform. La temo estis diskutita en junio 1946, kiam okaze de la enterigo de Kalinin en Moskvo aperis delegacioj el Jugoslavio kaj Bulgario, flanke de la bulgaroj konsistanta el kamaradoj GD, Kolarov kaj Kostov. La taktiko de Stalin konsistis el speco de intrigo, laŭ kiu Stalin ludis kun la jugoslavoj kaj bulgaroj koncerne la demandon, kiu el ili kaptu la iniciaton kaj ricevu la honoron por fondi Kominform. Fakte, Tito, kiu havis malagrablajn memorojn pri Komintern, en principo jam konsentis pri tiu ´honoro´. Dum iu vespermanĝo, al kiu Stalin invitis la du delegaciojn, li akre kritikis la laboron de Komintern en la ĉeesto de GD. Stalin faris multajn riproĉojn al GD, tiel ke tiu embarasiĝis, samtempe paliĝis kaj ruĝiĝis. Ankaŭ por la aliaj gastoj la situacio fariĝis malagrabla. GD ne kuraĝis pravigi sin, kaj Stalin daŭrigis sian manovron tiel, ke li klopodis gajni la favoron de la jugoslavoj. Tiel li fakte ĉiam kondutis, kiam li akceptis la jugoslavojn kaj bulgarojn kun la celo intrigi inter ili. Stalin emfazis, ke la restarigo de Komintern estu evitita en ĉiu kazo, sed ĝin devus anstataŭigi iu alia

organizaĵo, kadre de kiu la komunismaj partioj povu regule kunveni kaj interŝanĝi informojn kaj spertojn, eĉ preni decidojn sed nedevigajn. Kvankam Stalin jam proponis ekpreni la iniciaton por fondi Kominform, Stalin ankoraŭ demandis: „Kion vi opinias? Kiu kaptu la iniciaton? Ci, aŭ Walter (=Tito), aŭ la francoj? GD respondis: „Tion Walter povus fari.“ Sed Tito malkonsentis kaj respondis: „Lasu nin fari tion la francoj.“ Kaj la konversacio estis finita.[41] Ial GD ne partoprenis la fondan konferencon de Kominform en septembro 1947 en Szklarska Poręba kie BKP estis reprezentita de Ĉervenkov kaj Poptomov.

Laŭ Dedijer GD estis tiu, kiu plej klare inter la orienteŭropaj ŝtatestroj demonstradis, ke li ne konsentis kun la diktatoraj metodoj de Stalin, kaj ke li ne trovis ilin akcepteblaj por Bulgaro nek por Jugoslavio. Ĉi tiu observo, opinio aŭ pritakso de Dedijer sendube estas konsiderinda. Konata por apogi tiun ĉi sintenon fariĝis laŭ ĉi-koncerna artikolo en *NYT* ankaŭ la epizodo, rakontita kaj de Đilas kaj de Dedijer, ke GD kuraĝigis en la stacidomo de Topĉider la jugoslavojn resti firmaj kaj kuraĝaj kontraŭ la fiintencoj de Stalin). Ŝajnas, ke GD ankaŭ opiniis, ke oni ne povas kopii sovetiajn leĝojn por Bulgario, ĉar la diferencoj inter ambaŭ landoj estas tro grandaj. Ĉar tiu malkonsentema kaj kontraŭstarema sinteno de GD, kiuj evidente plifortiĝis ĉe GD post la faritaj spertoj kun Stalin, estis konata en Sovetunio, sovetiaj agentoj de Bulgario komencis izoli lin ĝis la vivofino. Kaj tio estas eblaj klarigoj, kial en la plej lastaj jaroj de lia vivo oni forigis GD-n el Bulgario kaj retenis lin en Sovetunio kaj instalis Stalin-obeemajn marionetojn en Sofio. Taŭgaj kuracistoj ekzistis ankaŭ en Bulgario, kaj en kazo de neceso oni povus mendi por GD sovetiajn kuracistojn al Bulgario. [42] Sed ankaŭ Dedijer en sia kontraŭstalinisma entuziasmo naive troigis la „revolucian fidindecon“ kaj „intelektan integritecon“ de GD, kiu estis finfine la sama kanajlo kiel Stalin kaj Tito, eĉ se en kvante malpli granda dimensio, kvankam ĉiuj el ili evidente respondecis por la morto kaj persekutado de miloj da senkulpaj homoj, pri kio la komunismaj historiistoj komplete silentis.

Stalin estis fifama pro siaj perfidaj aludoj kaj mokoj, kiujn li faris ekzemple pri diversaj popoloj (kiuj poste fariĝis ankaŭ viktimo de liaj persekutoj). Iujn popolojn kiel ekzemple la ĉuvaŝojn li evidente konsideris „primitivaj“. Sed kial ĝuste la ĉuvaŝojn? Dedijer rakontis ankaŭ pri jena konversacio okazinta inter Stalin kaj Kardelj en la jaro 1947. Kiam ambaŭ diskutis pri la albanoj, Stalin subite faris la rimarkon, ke „ili ŝajnas esti sufiĉe subevoluinta kaj primitiva popolo“, por konstati, ke „jes, ili estos fidelaj kiel la hundoj, tio estas tia karakterizaĵo de la primitivaj (popoloj). Niaj ĉuvaŝoj estis samaj.“[43] Neklare estas, ĉu Stalin finfine celis ankaŭ aludi la bulgarojn. Kiel konate, laŭ malnova hipotezo la ĉuvaŝoj estas konsiderataj kiel la posteuloj de la volgiaj prabulgaroj, unu el la popoloj, kiuj migris en la hodiaŭan Bulgarion, kie la volgiaj prabulgaroj kun la trakoj kaj slavoj formis la etnogenezon de la nova bulgaro popolo.

## *10. La fiasko de GD ĉe la plano starigi balkanan federacion kaj la titoismo. La stalinisma agresemo de Bulgario kontraŭ Jugoslavio en 1948.*

La “venko” de Sovetunio en orienta Eŭropo, la okupo de Bulgario fare de la Ruĝa Armeo kaj la enkonduko de la “socialismo” (t.e. stalinismo) en Bulgarion dume ne ekskludis la eblecon gvidi ankaŭ memstaran regionan politikon. Tio montriĝis kiam ĉe la bulgaroj kaj jugoslavoj revekiĝis la ideo krei “Balkanan Federacion”. Fakte, tiu ĉi revo por kunligi la sudslavajn landojn ne estis nova, kaj ĝin havis ne nur socialistoj kaj komunistoj, aŭ nur bulgaroj kaj jugoslavoj, kiuj kredis, inter alie, ke per tia unuiĝo la ‘makedona demando’ povos esti solvita. Kaj Tito kaj GD estis entuziasmaj apogantoj de la federacia opcio. Post la transpreno de la politika povo fare de la komunistoj en tiuj landoj la momento ŝajne venis por revivigi la projekton. Fakte, eĉ Stalin favoris ĝin, ĉar li esperis, ke la konstruaĵo de forta sudslava unio povos bridi la malfacile kontroleblajn ambiciojn de la fiera jugoslava partizana gvidanto Josip Broz Tito. Krom tio, li esperis, ke tia projekto neŭtraligos la britajn interesojn, kiuj tradicie ekzistis en Balkanio. Sed la aferoj ne tute evoluis en la direkto dezirata de Stalin, ĉar Tito

[41] Laŭ V. Dedijer, Tito (germana eldono), p. 283s.
[42] Laŭ V. Dedijer: Stalins verlorene Schlacht, Wien 1970, p. 163-6.
[43] Laŭ V. Dedijer, Tito (germana eldono), p. 295.

kaj GD montriĝis tro memstaraj kaj kapricaj. Tito nepre kontraŭstaris la enmiksiĝon de ekstere, precipe de Moskvo, kaj havis proprajn planojn, ĉar kun la intenco akapari ankaŭ grekan Makedonion, Albanion kaj partojn de Aŭstrio kaj Hungario li celis enkadrigi Bulgarion kiel sepan respublikon en tian sudslavan union. Sed tia koncepto tute ne plaĉis al la bulgaroj, kiuj preferis federacion de egalrajtaj partneroj. Kiam la diversaj planoj estis submetitaj al Stalin, la sovetia gvidanto decidis favori la jugoslavian varianton. La 2an de aŭgusto 1947 jugoslavoj kaj bulgaroj renkontiĝis en Bled kaj subskribis kontrakton pri ekonomia, kultura kaj ĝenerala kunlaboro kaj interkonsentis pri la starigo de komuna "Unio de la sudslavaj popolrespublikoj" (kio estis konfirmita okaze de la reciproka vizito de Tito la 27an de novembro en Evksinograd apud Varna, Bulgario), kion GD notis en sia Taglibro per la evidenta ĝoja rimarko, ke li „tostis je Tito".[44] En Bulgario Tito emfazis, ke la komuna ŝtato estos fortika unuiĝo, kiu kapablos defendi sin en ĉiu kazo. La jugoslava-bulgara aventuro ne estis finita. Kiam en januaro 1948 GD invitis en Bukareŝto ankaŭ Rumanion, Hungarion, Albanion, Ĉeĥoslovakion, Pollandon kaj eĉ Greklandon (post la komunisma venko en la civitana milito) aliĝi al tia balkana federacio kaj klarigis la ĉi-rilatajn aferojn en la gazeto *Pravda*, Moskvo reagis kun ĉagreno, kaj per vetoo. Stalin rifuzis la planon de Tito kaj GD starigi "duan centron de la monda komunismo" kaj komencis suspekti, ke GD fariĝis nura lakeo de Tito. En la telegramo, kiun GD ricevis el Moskvo, la sovetia diktatoro nemiskompreneble sciigis al la bulgara partiestro, ke lia sinteno ne estas aprobinda kaj ke la dogana unio, kiun GD celis starigi kun Rumanio, ne estas dezirinda. Post kiam la gazeto *Pravda* publikigis akran kritikon pri la artikolo de GD pri ĉi tiu afero, GD konsterniĝis kaj panike defends sin per la embarasa averto, ke oni ne devus publike montri al la malamikoj, ke ekzistas diferencoj inter la sovetiaj kaj bulgaraj komunistoj. Kiam la 10an de februaro bulgara kaj jugoslavia delegacioj estis vokitaj al Moskvo, la "konsultiĝo",[45] dum kiu la malharmonio inter la diversaj flankoj, precipe sovetia kaj bulgara, klare manifestiĝis, finiĝis per draŝa kritiko al ambaŭ delegacioj, en kiuj GD ĉeestis kaj Tito mankis. Okazis eĉ akra kunpuŝiĝo inter GD kaj Stalin, kiu riproĉis al la bulgaro, ke rilate la federaciajn planojn li tro multe parolas en intervjuoj, kvazaŭ kiel foira virino aŭ ke li daŭre estus la ĝenerala sekretario de Komintern. GD estis daŭre interrompita de Stalin, kiu estis kolera. Dedijer notis en sia GTito-biografio la tutan naŭzan konversacion. Milovan Đilas poste rakontis en siaj libroj, ke la heroo de Lepsiko estis traktita kaj humiligita de la sovetianoj, nome de Stalin kaj Molotov, kiel bubo, kiu „staris kun ruĝaj oreloj kaj ruĝaj makuloj sur lia vizaĝo" antaŭ Stalin „kiel batita hundo", al kiu la sovetianoj „ŝtopis la buŝon". Sed ne nur GD enkasigis fortajn riproĉojn de Stalin kaj devis konfesi siajn "erarojn". Ankaŭ Trajĉo Kostov, alia membro de la bulgara delegacio, kiu volis diskuti pri ekonmiaj temoj la tiusence aŭdacis interrompi la diskuton kun Stalin kaj kritiki la sovetian ekonomian politikon, rikoltis la koleron de Stalin kaj restis negative en lia memoro (kio havos fatalajn sekvojn). Ĉi tiu dato signifas gravan turnopunkton en la rilatoj de Stalin kun la jugoslavoj, kiujn li konsideris kiel herezulojn, kiujn li povas ankaŭ trakti kiel tiajn. Koncerne la politikan povon en Bulgario, Dedijer rimarkigis en sia Tito-biografio, ke GD „naĝis" inter du branĉoj, je kiuj la CK de BKP estis dissplitita, kiujn formis Kostov kaj Jugov unuflanke kaj Ĉervenkov kaj Cankov aliflanke. Kio indikas, ke furoris akra lukto pri la reala politika povo, kiu finfine estis decidita de la rusoj, kiuj enmiksiĝis en la aferojn de Bulgario.

La fido de la jugoslavoj je la bulgaroj estis detruita, kiam en aprilo 1948 ili ricevis tre malagrablan leteron el Sofio, kiu estis subskribita de V. Ĉervenkov kaj kiu enhavis diversajn ofendojn kontraŭ la jugoslavoj. En la letero estis riproĉite al la jugoslavoj, ke ili ne sufiĉe aprezas la rolon de Sovetunio lige kun la batalo kontraŭ la imperiismo kaj ke ili neas kelkajn principojn de la marksisma-leninisma doktrino. Ĉervenkov, la aranĝita lakeo de Stalin, kontestis, ke la jugoslavoj mem liberigis sin de la germana sklaveco, ĉar tia venko ne povis esti ebla sen Sovetunio kaj sen la sovetia armeo, ktp. Fine, Ĉervenkov eĉ minacis la bulgarajn komunistojn per la averto, ke li kontraŭbatalos ĉiajn tiajn asertojn, kaze ke la „kontraŭmarksismaj vidpunktoj de parto de la gvidaj jugoslaviaj kamaradoj" estos

[44] Kiel Đilas rakontis en siaj Memoroj, Tito kaj GD tre ŝatis unu la alian, ankaŭ ekzistis reciproka simpatio inter la bulgara kaj jugoslava (ĉefe serba kaj makedona) popoloj. Stalin rimarkis tiujn simpatiojn kaj klopodis intrigi inter bulgaroj kaj jugoslavoj (ekzemple tro laŭdante la jugoslavojn kaj mokante pri Bulgario aŭ malrespekte traktante GD-n kaj aliajn bulgarojn). Sed kiel Đilas ankaŭ klarigis, la rilatoj inter jugoslavoj kaj bulgaroj „ne estis naturaj": "La rilatojn alternis malvarma suspekto kaj romantika, infaneca entuziasmo". (Memoroj, germana eldono 1992, p. 146).

[45] Kiu estas dokumentita en la Taglibro de GD, interese priskribita de V. Dedijer en la ĉapitro 19 de lia *Tito-biografio* (sbkr. 1952, germane 1953, en Esperanto 1954), kaj anekdotece prinotita de M. Đilas en *Interparoloj kun Stalin* (Stuttgart 1963, p. 217-226) kaj en *Memoroj* (München 1992, p. 183-193). Dedijer menciis, ke Stalin kredeble havis la planon enkadrigi Bulgarion kaj Jugoslavion en Sovetunion, kaj laŭ Đilas ekzistis la plano de la fizika likvido de Tito kaj de la jugoslaviaj gvidantoj.

disvastigataj en Bulgario kaj „damaĝe influos“ la membraron de la bulgara CK. Ĉi tiu mesaĝo, kiun la jugoslavoj konsideris kruda kaj perfida, fakte signifis kaŭzon por ĉesigi la interparolojn pri la jugoslava-bulgara federacio kaj faris ankaŭ pluajn akceptojn de GD superfluaj kaj sensencaj. Fariĝis evidente kajenpr klare, ke GD perdis sian povon en la bulgara politburoo, kies nova forta mastro estis Ĉervenkov, kiu ricevis de Stalin la licencon por forpuŝi GDn.[46] Kiel plej lasta amiko de Tito en la orienta bloko, GD gratulis lin je lia baldaŭa naskiĝtago en majo. La postan monaton Tito same faris por gratuli al GD okaze de ties naskiĝtago, kion GD danke respondis. Por la plej lasta fojo. Por premi Jugoslavion post ĝia rompo kun Stalin, la bulgaroj sendis soldatojn ĉe la komunan landlimon, kaj la bulgaraj-jugoslaviaj rilatoj estis definitive detruitaj. GD jam ne povis eviti tiun provokon. Dedijer menciis ankaŭ, ke en 1952 bulgaraj „teroristoj“ provis mortigi Titon, sed finfine alia alta oficiro fariĝis la viktimo de tia atenco.

Kvankam dum tiu legendeca kaj memorinda pintkonferenco en Moskvo Stalin donis la benon al la jugoslavia-bulgaria-albania konfederiĝo, sed nepre sen Rumanio, Hungario kaj Pollando,[47] la projekto tamen fiaskis pro pluraj kialoj. Post la reveno de la jugoslavoj el Moskvo okazis kunsido de la politburoo de la jugoslava KP, dum kiu la entuziasmo pri federacio kun Bulgario flanke de Tito klare ŝrumpis. Unue, la politikaj sintenoj kaj interesoj de la diversaj flankoj estis tro diverĝaj; due la malfido inter la diversaj protagonistoj restis sufiĉe forta, kaj la enmiksiĝo de Stalin estis konsiderata kiel tro kruda kaj ofendis la partnerojn. Trie, la jugoslavoj, kiujn Moskvo finfine konsideris kaj kalumniis kiel kontraŭ-sovetiajn „trockiistojn“, ĉar ili ne intencis submetiĝi al la volo de Moskvo, distanciĝis de Stalin kaj de la sovetia bloko, kaj baldaŭ okazis grava skismo, kiu kondukis al la eksigo de Belgrado el Kominform. Kvare, GD, kiu estis politike malforta kaj nura lakeo de Moskvo, ne povis mem efektivigi la federacion sen Tito. Krom tio, ŝajnas, ke ankaŭ la okcidentaj potencoj kaj Albanio ne estis serioze interesitaj pri tia balkana federacio (en Albanio alia ekstrema komunisma diktatoro, Enver Hoxha, rompis kun Tito en 1948 kaj kun Moskvo en 1961 kaj kuiris sian propran politikan supon, kio finfine kondukis al la totala izoliĝo de tiu lando[48]).

Dedijer poste raportis en siaj memuaroj, baziĝante sur fidinda fonto, ke li sukcesis ekscii kaj kompreni la verajn intencojn de Stalin rilate la kreadon de la balkana federacio, kaj disvastigis jenan hipotezon: Tiam Stalin ludis kun la ideo enkadrigi ĉiujn orienteŭropajn ŝtatojn, inkluzive de Jugoslavio, en la teritorion de la sovetia ŝtato. Tio devintus okazi en du fazoj: Pollando kaj ČSSR devintus formi la unuan federacion, poste Rumanio kaj Hungario la duan kaj plej laste Bulgario kun Jugoslavio. En dua fazo estis planate kunfandi tiujn novajn federaciojn kun Sovetunio.[49]

## *11. La ‘antaŭprepara’ rolo (aŭ ŝajna kontribuo) de GD por la farsproceso kontraŭ Trajĉo Kostov (1949).*

Post tiuj perturboj, la ordo en la stalinisma regno devis esti restarigita. Tito kaj la “titoismo” estis herezigataj de Moskvo kiel provo de “faŝismaj fortoj” por renversi la socialisman reĝimon kun la financa helpo de la kapitalisma Okcidento. Do, Stalin nepre celis la venĝon je Tito kaj la titoistoj, kiuj kuraĝis kontraŭstari lian politikan ordon. La sovetia registaro konsideris aparte grave restaŭri tiun ordon en Bulgario kaj ekstermi ĉiajn ideojn pri memstara balkana politiko. En novaj partiaj purigoj multaj iamaj kontraŭfaŝismaj aktivuloj estis ekskluditaj kaj anstataŭigitaj per membroj kaj funkciuloj, kiuj estis eĉ pli lojalaj al la sovetia registaro. Samtempe, Stalin taskis la fifaman estron de la sovetia sekreta servo, Lavrentij Berija, serĉi “titoistojn” en ĉiuj satelitaj ŝtatoj kaj prepari procesojn kontraŭ ili. Ankaŭ en Bulgario “titoistoj” devis esti serĉataj kaj trovitaj. Fakte, en Bulgario GD mem, la plej proksima ´amiko´ de Tito, povintus esti elektita kiel ‘ideala’ titoisto, sed lin, la heroon de Lepsiko, kiu estis admirata de la

[46] Laŭ V. Dedijer, Tito (germana eldono), p. 344s.

[47] Dum Stalin opiniis, ke inter bulgaroj kaj jugoslavoj ekzistas „rasa“ komuneco, inter Bulgario unuflanke kaj Rumanio, Hungario kaj Pollando aliflanke li ne povis vidi historiajn rilatojn, kio signifas, ke tiuj landoj apenaŭ povas federiĝi.

[48] En siaj *Memoroj* Đilas detale raportis pri la problemoj kun Albanio.

[49] V. Dedijer: Stalins verlorene Schlacht, Wien 1970, p. 92. Dedijer rimarkigis ankaŭ, ke oni probable ekscios la veron pri tiu ĉi afero nur kiam la sovetiaj arkivoj malfermiĝos. Ĉu tio intertempe okazis rilate al tiu ĉi kazo kaj ĉu oni povis eltiri la esencon kaj konfirmi la hipotezon de Dedijer, mi ne scias.

komunistoj kiel duondio, oni ne intencis publike malmunti kaj oferi kiel buĉaĵo sur la altaro, ĉar GD estis tro populara kaj devis daŭre ludi la rolon de la netuŝebla komunisma ĉefsanktulo por Bulgario, ankaŭ postmorte, por garantii la koherecon de la komunismo en Bulgario. Krom tio, GD estis grave malsana, kaj la ruzulo Stalin havis kun li alian planon kiel forigi lin de la bulgara sceno.

Do, en preskaŭ ĉiuj orienteŭropaj socialismaj landoj estis lanĉitaj novaj farsprocesoj, ĉifoje kontraŭ la "titoistoj".[50] En Bulgario, kiel eblaj viktimoj por tia farsproceso prezentiĝis precipe Vasil Kolarov, Anton Jugov kaj Trajĉo Kostov. Kolarov estis intima kunbatalanto de GD el la fondaj tempoj, sed li estis tro maljuna, kaj malsana, do foruzita kaj neutiligebla por tia proceso. Ankaŭ la aĉulo Jugov, timata kaj malrespektata de ĉiuj, ĉar siatempe li lanĉis la sangan teroron kontraŭ centmiloj da "popolaj malamikoj", ankaŭ ne taŭgis. Restis do nur Trajĉo Kostov, kiun oni povis misuzi por tiu celo ankaŭ lige kun la demando kiu fariĝu la posteulo de GD mem. Kostov, naskita en 1897, filo de fervoja laboristo, faris modelan karieron en la komunisma partio dum la intermilita tempo, kie li kondutis kiel heroo, riskante sian vivon, por ne esti kaptita de la "faŝisma" registaro. Dum la milito li gvidis ankaŭ partizanan taĉmenton. Ĝis la reveno de GD li okupis la oficon de la ĝenerala sekretario de BKP. Do, en la partio Kostov ĝuis altan reputacion, tiel ke dum iu tempo iuj konsideris lin la ideala posteulo de GD, anstataŭ Kolarov, malgraŭ lia korpa kripleco, kiun li havis depost la akcidento en 1924. Sed ĉe Kostov estis grava obstaklo por fari lin denuncebla kiel titoiston: Ĝuste Kostov plej malfidis la koncepton de Tito pri la sudslava federacio, kvankam GD klopodis disblovi lian skeptikon. Kostov eĉ adoptis la stalinajn kalumniojn kontraŭ Tito, kiu tre malŝatis tiun bulgaron. (Eble okazis miskompreno kun Kostov, ĉar tiuj kiuj intrigis kontraŭ la jugoslavoj estis poste la bando ĉirkaŭ Ĉervenkov). Tamen, Kostov ŝajne estis ĉio alia ol titoisto. Sed por Berija la tasko transformi ne-titoiston en titoiston ne estis malfacila. La stalinismaj reĝisoroj bone konis la metodojn por igi konkretan personon konfesi, sub premo, ke li estis "malamika agento" k.s. Ŝajnas, ke eĉ Tito persone mem helpis denunci la altnivelan bulgaran komuniston, liverante kelkajn "faktojn" kaj "pruvojn". Laŭ iuj dokumentoj, en januaro 1949 ankaŭ GD riproĉis al Kostov "naciisman sintenon" kaj "intelektan individuismon" kaj petis la politburoon diskuti la "erarojn" de Kostov. Sed la letero de GD, en kiu li avertis la partion antaŭ Kostov kaj kiun oni trovis post lia morto, verŝajne estis falsita, ĉar verdire GD rifuzis partopreni la intrigojn kontraŭ Kostov, kies reelekton en la politburoon GD apogis en decembro 1948 dum la Va partia konferenco de BKP. La kampanjo kontraŭ Kostov prokrastiĝis kaj estis akcelata nur post la malapero de GD el Bulgario. La 26-27ajn de marto 1949 la CK de BKP kunsidis, kaj Kostov raportis memkritike pri la "krudaj politikaj kaj partidamaĝaj eraroj", kiujn li faris. Kostov perdis siajn funkciojn de la vicĉefministro kaj prezidanto de la partia komisiono por ekonomio kaj financoj. La politburoo ekskludis lin el sia sino, sed li rajtis resti membro de la CK kaj labori kiel direktoro de la nacia biblioteko. Kontraŭ tiu 'milda' traktado de "partia malamiko" protestis kelkaj pli junaj funkciuloj, inter ili Todor Ĵivkov, kiu tiam estis ankoraŭ malmulte konata sed jam funkciis kiel distrikta sekretario en Sofio.[51]

La akuzo kontraŭ Kostov estis submetita al Stalin komence de majo 1949 kaj akceptita de li. La 27an de majo Kostov eĉ daŭrigis sian memkritikon. Inter alie li bedaŭris, ke li kaŝis gravajn ekonomiajn informojn (aŭ sekretojn) antaŭ la sovetianoj lige kun la komerco kun kapitalismaj landoj, kio estis neniel tolerebla. Sed lia memkritiko estis konsiderata kiel nesufiĉa. Oni deklaris lin malamiko de la partio, kiu celis subfosi la aŭtoritaton de GD kaj intencis detrui la partion. Post kiam en junio Vâlko Ĉervenkov,

---

[50] Stalinismaj farsprocesoj pro „trockiismaj, titoismaj, cionismaj, kontraŭrevoluciaj" k.a. motivoj, okazis en tiu tempo ankaŭ kontraŭ Koçi Xoxe en Albanio, József Kardinalo Mindszenty kaj László Rajk en Hungario, Rudolf Slánský en i, Ana Pauker en Rumanio kaj kontraŭ Paul Merker, Georg Dertinger, Walter Janka kaj Wolfgang Harich en GDR. En Pollando Stalin provis denunci W. Gomułka kiel trockiiston, sed li ne sukcesis kaj anstataŭ tio lanĉis en 1951 farsproceson kontraŭ iuj generaloj, kiuj estis akuzitaj kaj kondamnitaj pro „spionado kaj helpo favore al la usona imperiismo".

[51] Post la akaparo de la povo fare de la komunistoj Todor Ĵivkov estis nomita kiel estro de la nove fondita popola milico (polico). En ĉi tiu funkcio li estis envolvita en la politika teroro kaj la persekutado de „popolaj malamikoj" (vd. Junes, Tom u. Stanoeva, Elitza: Todor C. Schiwkow (1911-1998). En: Sabrow, Martin u. Schattenberg, Susanne (Hg.): Die letzten General-sekretäre. Berlin 2018.). Post la persona akaparo de la povo fare de Ĵivkov la teroro estis reduktita, sed la neeltenebla sistemeca subjugado de la civila socio fare de la komunismaj organoj, precipe de la partio kaj de la fifama sekureca servo, restis konser-vata kaj kondukis al neimagebla stagnado kaj izoliĝo de la lando, dum Ĵivkov evoluis kiel kvazaŭ-absolutisma ĉiopotenca reganto de la lando, ĉirkaŭ kiu estis praktikata bizara personkulto. (vd. Bericht von Dr. Ivan Nikolov, Vorsitzender der Union der Repressierten vom kommunistischen Terror: Der Kommunismus in Bulgarien und seine Folgen. Veröffentlicht vom Osteuropa-Zentrum Berlin. Sen dato.). Je la konto de Ĵivkov iris ankaŭ la fifama deviga bulgarigo de la turkoj kaj t.n. pomakoj en Bulgario en la 60-80aj jaroj, kiu signifas senekzempla lezadon en la historio de la homaj rajtoj..

membro de la politburoo kaj rivalo de Kostov, ricevis de Stalin en Moskvo novajn instrukciojn, la akuzoj kontraŭ Kostov estis fortigitaj. Kostov estis kvazaŭ oficiale nomata "maldekstra deviaciisto" kaj "titoisto" (titoisto signifis samtempe kontraŭsovetian usonan agenton). Pri ĉio tio GD ne estis konsultita en Moskvo. Ĉi tiuj akuzoj certe sufiĉis por likvidi tian "perfidulon." Nun, Kostov, kiu perdis ankaŭ sian parlamentan mandaton, estis ekskludita ankaŭ el la partio. Kolarov, kiu apogis la intrigon, estis kontenta kaj Kostov povis esti arestita. Lia aresto restis dume publike sekreta kaj estis sciigita nur per malgranda anonco en la partia ĉeforgano iom poste. Kiel oficialaj kialoj de lia aresto estis menciitaj ekonomia sabotado kaj spionado favore al la imperiismaj potencoj. Kune kun Kostov estis arestitaj 200 aliaj altaj partiaj kaj registaraj funkciuloj, kiuj havis oficajn aŭ privatajn kontaktojn kun Kostov. En la prizono Kostov suferis kruelajn metodojn de turmentado kun la aktiva partopreno de kolonelo Miĥail T. Liĥaĉov. Kiel modelo por la proceso, kiu estis kontrolata de Viktor S. Abakumov, sovetia ministro pri ŝtata sekureco, kaj de M.F. Bodorov, sovetia ambasadoro, kontraŭ Kostov servis la materialo, kiu estis utiligata jam en la proceso kontraŭ László Rajk, kiu okazis iom antaŭe en Hungario. La akuzon mem aŭtoris generalo D.T. Ĉernjov, sofia rezidanto de MVD. En la aktoj kontraŭ Kostov troviĝis eĉ atestoj, kiuj asertis, ke Kostov kaj Tito celis mortigi GD-n kun usona konsento. La proceso kontraŭ Kostov komenciĝis la 8an de decembro 1949 kaj daŭris sufiĉe longe, ĉar Kostov montriĝis tre persista kaj kontraŭstarema. Dek akuzitoj sidis apud Kostov en la salono kie okazis la proceso, inter ili Ivan Stefanov, financministro, Nikola Pavlov, vicministro pri konstruado, Vasil Ivanovski, gvidanto de la propaganda sekcio, kaj Coniu Conĉev, guberniestro de la nacia banko. Post multaj turmentoj Kostov finfine subskribis iun konfeson, kiu konfirmis ĉiujn akuzojn direktitajn kontraŭ li. La celo de la proceso estis 'pruvi', ke Tito, Kardelj, Đilas kaj Ranković estis marionetoj de la britoj kaj usonanoj por faligi la bulgaran popodemokration kaj konduki al ĝia disiĝo de Sovetunio. En la radio Kostov publike retiris sian konfeson, kio estis neatendebla sensacio kaj ne antaŭvidita de la procesaj reĝisoroj. Post kiam la juĝistoj prezentis iun leteron, en kiu Kostov denove konfirmis la pravecon de ĉiuj akuzoj kontraŭ li (eventuale surbaze de falsita dokumento), li estis mort-kondamnita kaj pendigita la 16an de decembro 1949. Pluraj bulgaraj kunlaborantoj de la usona ambasado estis arestitaj, akuzitaj pro spionado kaj same mort-kondamnitaj. Post tiu skandalego en 1950 Usono rompis la diplomatiajn rilatojn kun Bulgario kaj restarigis ilin nur en 1959. Post la proceso kontraŭ Kostov, kiu jam okazis kelkajn monatojn post la morto de GD, la komunistoj lanĉis novan histerian kampanjon kontraŭ laŭdiraj kaj efektivaj malamikoj de la reĝimo. Centmiloj da senkulpaj civitanoj estis denuncitaj kaj ricevis drastajn punojn, kiujn ili devis efektivigi dum multaj jaroj en malliberejoj kaj labor-koncentrejoj. Ankaŭ Jugov kaj Terpeŝev estis akuzitaj kaj perdis siajn funkciojn.

La oficiala komunisma historiografio de Bulgario* ne traktis la proceson kontraŭ Kostov kaj prisilentis lian nomon.[52]

## *12. La 'prepara' rolo (aŭ ŝajna kontribuo) de GD por la instalado de Vâlko Ĉervenkov (1950) kiel nova partiestro.*

Post la morto de Kolarov kaj de GD mem, la forpuŝo de Jugov kaj la likvido de Kostov, la vojo liberiĝis por Vâlko Ĉervenkov, blinda oportunisma lojalulo de la aktualaj regantoj, kiu povis forigi de si ĉiujn rivalojn kaj esti instalita kiel nova partiestro. La 1an de februaro 1950 li transprenis la postenon de la ĉefministro. En la partia gazeto *Rabotniĉesko delo* estis publikigita letero, en kiu GD verve laŭdis sian bofraton (!) Ĉervenkov, kiu estis ankaŭ lia iama persona gardisto, kvankam li antaŭe observigis lin sekrete en la nomo de Stalin kaj Berija.[53] En novembro Ĉervenkov estis elektita ankaŭ kiel nova ĝenerala sekretario de BKP kaj do okupis la postenojn, kiuj post la malapero de GD fariĝis liberaj. En la

[52] Depende de la periodo kaj aŭtoro: Ĉe D. Kossev, Ch. Christov, D. Angelov: Bulgarische Geschichte. Fremdsprachenverlag Sofia 1963, nek la proceso nek la nomo de Kostov estas menciitaj, kvankam li estis rehabilitita jam en aprilo 1956. Ĉe Ch. Christow: 1300 Jahre Bulgarien. Sofia-Press 1980, kiu en principo ripetis la historiajn ‚verojn' de la libro de 1963, la nomo de Kostov estis almenaŭ menciita kun la eta klarigo, ke li fariĝis viktimo de malpravaj akuzoj (p. 233). Aliflanke, la persona kulto ĉirkaŭ V. Ĉervenkov estis malaprobita kun emfazo.

[53] En sia Tito-biografio el la 1950aj jaroj (kiu estis tradukita ankaŭ al Esperanto), Dedijer menciis, ke Ĉervenkov timis la NKVDn kaj serĉis protekton ĉe GD.

sekvo, Ĉervenkov realigis ĉiujn postulojn de sia majstro en Moskvo, Iosif Visarionoviĉ Stalin, kaj daŭrigis la sisteman purigadon de la partio. Ĝis aprilo 1950 pli ol cent mil personoj estis eksigitaj el la partio, inter ili ses membroj de la politburoo, dek tri membroj de la CK kaj dek iamaj ministroj. En somero 1950 ankoraŭ sep "kostovanoj" estis arestitaj kaj kondamnitaj al dumviva puno en prizono. Multaj viktimoj de Ĉervenkov retrovis sin en laborlagroj. La "malgranda Stalin", kiel la nova partiestro estis nomata, enkondukis propran groteskan personan kulton kaj eniris en la historion de Bulgario kiel komunisma politikisto, kiu efektivigis rigoran ideologian indoktrinadon kaj politikan egalŝaltadon de ĉiuj sociaj fortoj, ankaŭ por subpremi la etnajn minoritatojn, kiuj preferis forlasi la landon, en kiu la religiaj komunumoj estis detruataj aŭ strikte kontrolataj far la ŝtatpotenco.[54] Nur post la enoficiĝo de Ĥruŝĉov kaj la forigo de Ĉervenkov, Kostov kaj la aliaj akuzitoj estis parte rehabilititaj en aprilo 1956, post kiam ankaŭ BKP en si mem kondamnis la stalinisman personan kulton.

## *13. La malapero de GD el Bulgario kaj lia morto.*

Estante grave malsana (oficiale li suferis pro diabeto, hepata cirozo, kronika prostatito kaj kora malforto[55]), en marto 1949 GD subite forlasis Bulgarion por esti sendita al iu moskva kliniko, kie li forpasis la 2an de julio 1949 en la aĝo de nur 67 jaroj. Kompreneble, la cirkonstancoj de lia abrupta malapero el Bulgario estis akompanataj de diversaj spekulativoj kaj onidiroj. Iuj atestantoj rakontis, ke oni vidis lin en la flughaveno eniri la aviadilon, per kiu Andrej Vyŝinskij, la vicĉefministro de Sovetunio, flugis tra Sofio. Pri la kaŭzo de la malapero de GD regis longa silentado flanke de la partio, kiu nur en aprilo sciigis al la publiko per konciza gazetara komuniko, ke GD estis transportita al Sovetunio por la medicina kuracado. Oficiale, nur lia malsano, kiu akriĝis post lia arestado en germanaj prizonoj, estis la kialo por la translokiĝo al Sovetunio.[56] Sed kiel montris la supre priskribitaj cirkonstancoj, la oportuno sendi lin al la moskva kliniko pro malsano ideale kongruis probable ankaŭ kun la motivoj retiri lin de la politika scenejo kaj por fari ĝin libera por povi instali novan generacion de partiaj funkciuloj en Sofio, kiuj ne kaŭzis problemojn al Stalin. Kompreneble, tiuj eblaj motivoj kaj cirkonstancoj ne estis traktitaj en la oficiala historiografio*, kiun la publiko povis, aŭ devis legi. Ĉu GD eventuale estis mortigita de Stalin, kiel ankaŭ Đilas ne ekskludis la eblon, restis hipotezo kaj la kredo de spekulativantoj.[57] Tamen, kelkaj bulgaraj kuracistoj ne dubas, ke GD estis mortigita. En 1999 d-ro Petâr Gâlâbov de la Instituto por Antropologio kaj Morfologio de BAS kaj prof. Petko Lalĉev, kemiisto ĉe la Nacia Esplorinstituto por kriminalistiko ĉe la Ministerio pri internaj aferoj, anoncis la sensacian novaĵon, ke GD ne mortis pro angino, sed ke en la kliniko Barviĥa li estis venenigita per hidrargo, de kiu oni trovis sufiĉe grandan spuron en la korpo de GD. Tion konfirmis la tri kriminalistoj Jonov, Lalĉev kaj Daskalova okaze de kongreso pri medicino kaj kriminalistiko en 2001. Ili klarigis, ke en la hararo kaj en la konservata cerbo de la mortinto ekzistis spuroj de hidrargo en mortdanĝera kvanto. Ankaŭ la fama tribunala medicinisto prof. d-ro Georgi Cekov, kiu disponas pri longa sperto pri aŭtopsiado, montris sin konvinkita, ke GD estis mortigita per veneno.[58] La hidrargo eniris la mekanismon de GD, ĉar en sia oficejo en Barviĥa la hidrargo, kiun GD enspiris, troviĝis en kaŝita interspaco de la tirkesto de lia skribotablo, kiu havis duoblan plankon. Estas konate, ke inter GD kaj Stalin eksplodis kvereloj; la kompozitoro Dmitrij Ŝostakoviĉ fariĝis eĉ mem atestanto de tia retorika batalo mallonge antaŭ la morto de GD en Barviĥa. Ĉar GD ne estis tre tolerema tipo kaj malfacile eltenis kontraŭdirojn kaj aliajn opiniojn,[59] li do neeviteble kunpuŝiĝis ankaŭ kun la sovetia diktatoro, kiu tamen estis la pli potenca viro, kiu havis la okazon forviŝi GDn kiel ĝenan muŝon kiam ajn tio ŝajnis al li oportuna aŭ necesa.

Kompare kun aliaj partiaj funkciuloj, kiuj fariĝis tragikaj viktimoj de intrigoj, manipuloj kaj purigoj, GD restis unu el malmultaj, kvazaŭ senmortaj pintaj duonsanktuloj de la bulgara komunismo.

---

[54] Vd. Evelina Kirova: Die Minderheiten in Bulgarien seit 1944. Grin Verlag 2008.
[55] Vd. la bulgaran artikolon pri GD en Vikipedio.
[56] En sia libro pri la milito de la partizanoj, M. Đilas notis, ke ĉe GD aperis ĉiam novaj kaj pli komplikaj malsanoj.
[57] Eble indus legi jenan libron, kiun mi ne havis la okazon akiri: Петров, Н.: Загадката около смъртта на Георги Димитров. Plovdiv 2003.
[58] Laŭ V. Dedijer: Stalins verlorene Schlacht, Wien 1970, p. 168, ankaŭ la jugoslavia gazeto *Borba* suspektis, ke GD estas venenigita.
[59] Vd. http://www.trud.bg/Article.asp?ArticleId=640041.

Kompare kun Stalin kaj la stalinistoj, kiuj fariĝis malhonorataj fipersonoj kaj kies nomoj malaperis el la oficiala historiografio, la ´superstalinisto´ GD restis netuŝata ĝis la plej lasta tago de la komunisma reĝimo, kaj sekve devis esti adorata de la bulgara popolo, ankaŭ de la esperantistoj, kiuj regule gloris lin en siaj organoj kaj publicaĵoj kaj publikaj manifestacioj. Post lia forpaso, lia kadavro estis translokita al Sofio, kie je lia honoro oni konstruis pompan maŭzoleon, kiun oni starigis vidalvide de la iama cara kastelo. Ĝi enhavis la vitran ĉerkon, en kiu kuŝis, ekzakte laŭ la modelo de Lenin,[60] la enbalzamigita kadavro de GD, kiu ricevis eternan gardadon kaj fariĝis mito kaj legendo, ĝis kiam ĉe la kolapso de la komunismo ankaŭ li perdis la altan ŝtatan honoron – lia maŭzoleo estis eksplodigita en la jaro 1999[61] kaj GD enterigita en iu civila sofia tombejo kiel privatulo, por trovi la definitivan ripozlokon.[62]

## *14. La Taglibro(j) de GD (1933-49).*

Interesan materialon pri GD sendube provizas lia(j) Taglibro(j), kiu(j) estis publikigita(j) en 1997 en la originala (bulgara) lingvo, kaj poste tradukitaj kaj eldonitaj en la germana lingvo.[63] Malgraŭ la parte ŝajna banaleco de la enhavo, kiel opinias precipe iuj (okcidentaj) historiistoj, la Taglibroj peradas, laŭ diversaj recenzoj en la germana kaj svisa gazetaro,[64] realisman imagon pri la funkciado de la stalinisma burokrato GD ene de la mekanismoj kaj pens- kaj agostrukturoj de la totalisma sovetia sistemo. Sendube, tiuj Taglibroj, kiuj dum jardekoj estis enŝlosataj en la arkivo de BKP, tiel ke eĉ internaj cirkloj ne povis aliri ilin,[65] permesas konatiĝi kun interesaj aspektoj kaj konsiderindaj facetoj de la laboro, agado, funkciado, rolo kaj komplika situacio de GD, en kiu li troviĝis. Malgraŭ la abunda materialo de la Taglibroj, kiuj en la bulgara versio daŭras ĝis la 6a de februaro 1949 kaj kiuj en la germana versio estis tradukitaj nur ĝis la 12a de junio 1943, tiel ke la notoj de GD post lia reveno al Bulgario bedaŭrinde ne plu povis esti prezentitaj al la germanlingva publiko, la germanaj recenzintoj de la Taglibroj opiniis, ke tiuj Taglibroj ne povis tute kontentigi la atendojn de la historiistoj kaj politologoj, ĉar ili enhavas nenion esence novan kaj interesan pri la stalinismo mem. Sed ĉi tiu verdikta eble estis farita tro rapide, ĝenerale kaj supraĵe, precipe se ĝi estis prononcita el nemaldekstra vidpunkto, laŭ kiu oni probable klopodis bagateligi la signifon de la Taglibroj. Interesa estas krome la cirkonstanco, ke, kiel notis la eldonisto, la Taglibroj vekis pli grandan intereson en eksterlando ol en Bulgario mem, kio estas probable alia tragika kuriozaĵo, ĉar tio signifas, ke la bulgaroj evidente ne estas tro interesataj okupiĝi pri sia historia pasinteco. Multaj notoj en la Taglibroj tamen estas konsiderindaj kaj studindaj, sed ili ne estas kompreneblaj, se oni ne konas la kuntekston kaj la fonon en kiu ili estis skribataj kaj se oni ne estas informita pri la eventoj de la tiama historio, kies kono do estas nepre necesa. Kiel ajn, la biografio de GD ne povas esti reskribita sen la detala konsiderado de liaj Taglibroj.

Nature, la percepto kaj pozicio rilate al la celo kaj karaktero de la Taglibroj de GD forte varias kaj diverĝas laŭ la diversaj aŭtoroj. Tiel, en la enkonduko al la bulgara eldono, kiu estis verkita de Bojko Dimitrov, la adoptita filo de GD, kaj de la bulgara historiisto Ilĉo Dimitrov, oni trovas la klarigon, ke la Taglibroj de GD estis verkitaj de li „por la propra konsolo kaj por la propra uzado, kaj ke ĝi ne estis

[60] Kompari tion oni povas en tiuj ĉi filmoj: http://www.youtube.com/watch?v=eQqG6RK1PLI&feature=endscreen kaj http://www.youtube.com/watch?v=xH5hCAfi1bc

[61] Filmojn de la eksplodigo vd. http://www.bglegis.com/Dimitrov.html aŭ http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=vcgN2n_BTTY kaj http://bnt.bg/bg/news/view/13726/10_godini_ot_sybarjaneto_na_mavzoleja. Simile kiel en la kazo de la Berlina Muro, laŭ mi la detruo de la maŭzeoleo estis eraro, ĉar anstataŭ forigi ĝin oni estus povinta krei unikan muzeon pri la historio de la komunismo.

[62] Diversaj iamaj GD-lokoj en Bulgario rericevis sian malnovan nomon. En Lepsiko la GD-muzeo estis fermita kaj la placo nomata je lia honoro ricevis alian nomon. En Ruslando multaj stratoj kaj placoj k.a. objektivoj ankoraŭ portas la nomon de GD (vd. http://ru.wikipedia.org/wiki/Димитров,_Георгий_Михайлович#.D0.98.D0.BD.D1.82.D0.B5.D1.80.D0.B5.D1.81.D0.BD.D1.8B.D0.B5_.D1.84.D0.B0.D0.BA.D1.82.D1.8B.

[63] En la bulgara lingvo estis elektita la singulara versio Dnevnik (do taglibro), dum la germana traduko elektis la pluralan version Tagebücher (taglibroj), ĉar tiu taglibro fakte konsistis el 9 kajeroj (laŭ alia fonto el 18 kajeroj). Mi konsultis ambaŭ versiojn, ĉerpante por ĉi tiu studo nur unuopajn erojn, kiuj estas esence en rilato kun la traktitaj temoj.

[64] Vd. la suban bibliografion.

[65] Aliflanke ŝajnas, ke la ekzisto de la GD-Taglibro(j) tamen estis konata en la komunisma bloko. Tiel, ĝi estis menciita ekzemple en la oficiala GD-biografio (Sofia/Dietz Berlin 1972), sur p. 143, en la ĉapitro pri la lepsika proceso lige kun la Reichstag-incendio, kies akuzan agadon GD komentis kiel „frivolajn fifarojn!“

destinita por aliaj okuloj". Do, ĝi estis strikte privata kaj konfidenca Taglibro, kiu ne devis esti publikigita. Ŝajnas, ke per tia averto oni kvazaŭ celis protekti GDn kiel "homon de sia tempo" kontraŭ eventualaj atakoj kaj kritikoj de aliaj flankoj. Kompare kun la bulgaraj komentantoj, kiuj celas iel esti trankvilaj pri la historio kaj havi komprenemon por la situacio de GD en la konkreta tempo de la "konjunktura politiko", la enkonduko de la germanaj eldonistoj Bernhard H. Bayerlein kaj Wolfgang Engler faras preskaŭ la impreson de akra polemikaĵo kontraŭ la stalinismo, kiu konas neniajn kompromisojn. Nature, Ernstgert Falkhart Kalbe (*1931), 1974-91 ord. profesoro pri historio de USSR kaj de la socialismaj landoj de Eŭropo ĉe la universitato de Lepsiko (GDR), kiu en 1982 ankoraŭ publikigis ideologie strikte konformismajn kontribuajojn pri GD,[66] ne povas akcepti la "nesciencan" kondamnan sintenon de Bayerlein kaj Engler, kiuj vidis en GD ĉefe nur servuteman komparson kaj lakeon de Stalin, kiu havis neniun alian eblon ol silente aprobi kaj toleri ĉiujn praktikojn kaj krimojn de la stalinistoj, inkluzive de la purigoj, farsprocesoj kaj politikaj murdoj, kiujn eviti aŭ haltigi GD ne povis. Por Kalbe GD estis unuavice modela komunisto, kuraĝa batalanto kontraŭ la faŝismo, imperiismo kaj milito, elstara internaciisto kaj revoluciulo en la servo de la proletaro, sindikata kaj partia funkciulo kaj ĝenerala sekretario de Komintern. Kaj li estis la nekontestebla heroo de Lepsiko, kiu ludis enorman rolon por la antifaŝisma kaj komunisma movadoj.[67] Do, unuavice kun tiuj neforpreneblaj signifoj kaj meritoj GD fariĝu parto de la historio, kiel la komunismemaj maldekstruloj postulas.

Malgraŭ la enorma detalriĉeco de la notaro de la Taglibroj de GD, okulfrapas, aliflanke, la drastega mankeco de la mencio de gravaj faktoj, kiujn la leganto nepre atendus, ke ili estus menciitaj, precipe lige kun signifaj historiaj eventoj. Ĉu GD konscie prisilentis, aŭ forgesis ilin, aŭ ne konsideris ilin menciindaj aŭ ne havis la tempon noti ilin ? Tiel, ekzemple pri la jaro 1935 ekzistas nur malmultaj notoj kaj pri la VII Monda Kongreso de Komintern ili tute mankas. Ŝajnas, ke la koncernaj paĝoj estis elŝiritaj el la Taglibro. Tre kurtaj estas ankaŭ liaj notoj rilate al la Pakto pri Neagreso inter Germanio kaj Sovetunio de 1939, kiu evidente ne estis diskutata kun EKKI kaj kiu plene kompromitis la ĝis tiam validan kaj sanktan popolfrontan politikon, kiun GD tiom defendis. Tio signifis, ke GD devis rapide adaptiĝi al la kapricaj opiniaj ŝanĝoj en la ekstera politiko de Stalin, kiujn li persone eventuale eĉ ne aprobis (je lia ĝojo, la „kontraŭfaŝima popolfrontpolitiko" estis restarigita nur post la atako de Germanio kontraŭ Sovetunio en junio 1941). Interesa estas alia ekzemplo, nome ke en sia Taglibro GD notis en la 9a de septembro 1944 en seka tono nur la starigon de la registaro de la 'Patrolanda Fronto', sen ajna entuziasma patoso pri la alveno de la Ruĝa Armeo, la forigo de la malnova registaro kaj la transpreno de la povo fare de la komunistoj. Kial tiom modeste ? En la antaŭa tago, do la 8an de septembro, li menciis plej fine de la notaro inter aliaj malpli gravaj notaĵoj nur, ke la Ruĝa Armeo okupis la linion inter la Danubo (Ruse) kaj la Nigra Maro (Varna kaj Burgas). Sed la granda emocia hurao pri la "liberigo de Bulgario fare de la Ruĝa Armeo" totale forestas. Ankaŭ en la venontaj tagoj GD nenion skribis pri "socialisma revolucio" aŭ simile, sed male, li daŭrigis skribi sian Taglibron laŭ la sama seka stilo kiel li kutimis apliki ĝin ĝis nun, menciante multegajn personojn kaj aldonante iom da privataj bagateloj, sen fari longajn analizojn kaj komentojn el propra vidpunkto. Ekzistas multaj similaj tiaj kazoj. Tiel, ekzemple la grava evento de la 2a de aŭgusto 1947, la supre menciita subskribo de la jugoslava-bulgara kontrakto pri ekonomia, kultura kaj ĝenerala kunlaboro kaj la interkonsento pri la starigo de komuna "Unio de la sudslavaj popolrespublikoj" en Bled (Slovenio) ne estis notita de li. Anstataŭ tio, li limigis sin al la banalaj informoj, ke li veturis kun Tito al Ljubljana, ke en Zagrebo li renkontis la kroatan registaron, ke en Belgrado li adiaŭis la serban registaron kaj ke en la trajno al Niŝ li donis gazetaran konferencon. En la grava kazo de Nikola Petkov, kiu estis persekutita de la komunistoj, GD notis la 5an de junio 1947 nur, ke lia mandato de deputito estis forprenita. En la 16a de aŭgusto, la tago de la mort-kondamno de Petkov, tute mankas ĉi-rilata noto. Kaj la 23an de septembro, en la tago de lia ekzekutado, GD koleris pri la komparo, kiun la eksterlanda gazetaro faris inter la proceso kontraŭ Petkov kaj la lepsika proceso kontraŭ li mem, kaj postulis, ke oni „disbatu tian krudan falsadon". Kelkajn tagojn poste li aldonis en alia kunteksto la sloganon: „Morto al la sabotistoj kaj perfiduloj!" Do, kia modela, demokrata kaj pacama homo povis esti tiu socialisto kaj komunisto, kiu en sia Taglibro deziris la morton

---

[66] Vd. Ernstgert Kalbe: Georgi Dimitroff – konsequenter Internatonalist und Freund der Sowjetunion. Karl-Marx-Universität Leipzig, 1982. (rete: http://www.archiv.uni-leipzig.de/wp-content/uploads/wz-gesellschaft/Gesellschaftswissenschaftliche%20Reihe/optWZ_Ge_%201982_Heft%2002.pdf).

[67] Vd. Ernstgert Kalbe: Streit um Georgi Dimitroff zum Erscheinen der Tagebücher Georgi Dimitroffs. Diskurs. Vorwort von Klaus Kinner. Streitschriften zu Geschichte und Politik des Sozialismus. Heft 8. Leipzig 2001.

al aliaj homoj, eĉ se ili estis liaj malamikoj, kaj kiu en publikaj paroladoj alvokis al la disbato, likvido kaj ekstermo de la klasmalamikoj kaj opoziciuloj !?

Kiel Pavel Pisarev atentigis, la 22an de junio 1933 GD faris nur lakonan noton, kiam lia edzino Ljub(ic)a forpasis, sen klarigi la fonon de la vera tragedio. Ĉu tiu homo entute posedis privatajn sentojn, aŭ ĉu li estis nur iu ´homo politicus´ sen privateco kaj sen veraj amsentoj, por kiuj tempo ne restis ?

Krom tio, oni ankaŭ ne trovas noton pri la mort(ig)o de Trockij la 21an de aŭgusto 1940 en Meksiko. Ŝajnas, ke la sanstato de GD en tiu periodo malboniĝis, tiel ke li devis forveturi al Soĉi kaj esti esplorata en Barviĥa, tiel ke entute mankas notoj por pluraj tagoj en tiu tempo.

Kiel ajn, necesas ankaŭ agnoski la fakton, ke la verkado de tiuspeca taglibro estis sendube sufiĉe riska kaj danĝera entrepreno por la aŭtoro. Ĝia malkovro verŝajne povintus kaŭzi al li gravajn problemojn, ĝis la akuzo, kondamno kaj likvido de la verkanto. Iuj interpretantoj de la sinteno de GD vidis iun proksimecon al tiu de Trockij, la plej akra kontraŭulo de Stalin, kiu estis likvidia laŭ la komisio de NKVD en Meksiko. Aliflanke, estas ankaŭ vere, ke GD ne apartenis al la ultraj maldekstruloj, sed li montris tendencojn de la "dekstra oportunismo", precipe antaŭ 1933. Tiajn vivdanĝerajn suspektojn GD kontraŭis per ege enĝagata laboro favore al la komunisma movado, per ekstere senescepta persona lojaleco al Stalin kaj per sia neskuebla admiro de Sovetunio.[68]

## *Ĝenerala konkludo.*

De la komunisma propagando GD estis prezentata al la bulgaroj kiel senmakula modela komunisto, aperanta aŭtomate kaj samrange kiel aliaj ikonoj en la oficiala kaj netuŝebla nomenklaturo de la bulgara historio. GD estis listigita en la sama vico kun Ĥan Asparuĥ, princo Boris I., Kirilo kaj Metodo, Klemento de Oĥrido, popo Bogomil, caroj Simeon kaj Ivan Asen II., patriarko Evtimij, Paisij de Ĥilendaro, Neofit Bosveli, por nomi la ĉefajn figurojn de la mezepoko, kaj kun Georgi Rakovski, Vasil Levski, Ljuben Karavelov, Ĥristo Botev, P.R. Slavejkov, Dimitâr Blagoev, Goce Delĉev, Aleksandro Stambolijski kaj Vasil Kolarov, se temas pri la modernaj revoluciuloj. Malgraŭ tiu alta honoro, atribuita al li, GD restis en sia idealigata kaj heroigata rolo kiel "gvidanto kaj instruisto de la bulgara popolo" ĉiam modesta homo, kiel celis kredigi la komunisma propagando. En la (hagiografia) biografio de Petra Radenkova, kiu estis tradukita al Esperanto (Sofia-Press 1982), oni legas inter alie pri persona kulto jenon: „Dimitrov mem estas modelo de modesteco. Li kontraŭstaras la gloradon al lia adreso kaj antaŭgardas la gvidajn personojn kontraŭ trofierigo." Fine de sia libro Radenkova konkludis la esencon pri GD kun troigata patoso, kiun oni perceptas nuntempe kiel senintencan cinikon, se oni konas la veron pri GD: „Li estas inter tiuj historiaj personoj, kies ideoj havas konstantan valoron kaj enkarnigas en admirindaj faroj. Lia vivo donas flugilojn al milionoj da viroj kaj virinoj sur ilia vojo al progreso. Lia standardo de batalanto por paco kaj libereco de la popoloj, kontraŭ imperiismo kaj milito, troviĝas en la fortikaj manoj de la komunistoj, de ĉiuj progresemaj kaj honestaj homoj en la mondo." Al lia posteulo Todor Ĵivkov restis aldoni, ke „la vivo, pensoj kaj faro de Georgo Dimitrov estas nia netakseble valora nacia kapitalo".[69] Kaj kiam oni devas legi frazojn kiel tiujn: „Dimitrov estis longe daŭranta fulmo en la senĉesa movado de la homa lumo. Al la brutala forto li kontraŭstarigis la konsciencon", kiel skribis la franca poeto Paul Eluard -, tiam oni devas konstati, ke la senfina persona kulto ĉirkaŭ GD atingis kulminon, kiu estas groteska kaj naŭza.

Ĉu Asen Grigorov (+1985), Violin Oljanov (+1998), Ĥristo Gorov (+1999), Nikola Aleksiev (+2002) kaj aliaj ´eminentaj´ bulgaraj esperantistoj, (kon)sciis pri la krimoj de la stalinistoj, en kiujn GD estis enplektata kaj kiuj en iu studo estis komparitaj kun "genocido kaj holokaŭsto kontraŭ la bulgara popolo"[70] kaj pri la aliaj tabuoj traktitaj en ĉi tiu studo aŭ ĉu ili silente konservis ilin dumvive kvazaŭ

[68] Komparu la situcion de la vjetnama aktivulo Ho Chi Minh kaj lian kapablon elturniĝi en la ŝanĝiĝantaj politikaj embarasoj kaj pritaksoj de lia sinteno fare de la stalinistoj (sur http://www.planlingvoj.ch/Vjetnamio_HoChiMinh.pdf).

[69] Laŭ iama informo de *Bulgara Esperantisto* Ĵivkov lernis Esperanton en sia junaĝo, kio iusence helpis proklami lin esperantisto, pri kiu la bulgaraj esperantistoj ŝajne aparte fieris.

[70] Vd. http://www.extremecentrepoint.com/archives/14230.

kiel sekretojn, ne estas konate.[71] Ĉar ili vivis en la tempoj, kiam tiuj aferoj okazis, mi supozas, ke tiuj bulgaroj devis tamen almenaŭ ion scii. Sed kiel supre montrite, dum la komunismo ne eblis estis trakti tiujn temojn.

Sian imagon pri la "popoldemokratia" Bulgario GD priskribis en *Rabotniĉesko delo* (8.9.1946) jene (kaze ke li mem kaj ne la ŝtata propagando skribis tion): „Bulgario ne estos sovetrespubliko, sed ĝi estos popolrespubliko, en kiu la gvidan rolon havos la plimulto de la popolo – la laboristoj, kamparanoj, metiistoj kaj la popola inteligentularo. En la popola respubliko la fundamenta, decida faktoro estos la laboranta plimulto de la popolo, homoj kiuj faras socie utilan laboron, kaj ne la spekulativa grandkapitalo kaj minoritato de politike kaj morale putra kaj bankrota burĝa high-life." En la artikolo estis plue emfazite, ke la (modesta kaj sincere ellaborita) privata posedo estos protektata de la ŝtato, ke Bulgario estos libera de la monarkiismo, faŝismo kaj grandbulgara ŝovinismo, kaj ke Bulgario estos libera, sendependa kaj suverena nacia ŝtato. Ĝi ne intencos danci laŭ la fajfilo de diversaj kapitalismaj konzernoj, kiuj celas politike kaj ekonomie sklavigi malgrandajn popolojn. Aliloke, GD emfazis la signifon de la "parlamenta registaro" en tia popola demokratio. Ŝajnas do, ke esence tiuj elementoj formis la bildon de GD pri demokratio, kiu por li estis la sinonimo de socialismo. Kun la moderna demokratio, kiu estis konstruata en okcidenta Eŭropo, kaj ĝuste en la ´burĝa´ kaj kapitalisma FRG post la milito, tiu vizio de la komunistoj havis supozeble nenion komunan kaj probable estis ekster la imagopovo de GD, kies mondkoncepto estis totale fiksata je la mediokra dogma ideo-mondo de la kontraŭfaŝismo, kontraŭkapitalismo, marksismo-leninismo, socialismo kaj komunismo. La imago pri tia demokratio estis ĉe GD probable same nereala kiel ĉe L.L. Zamenhof la imago pri la eblo de la ekzisto de la nacia ŝtato, kia Pollando fariĝis post la unua mondmilito.

Malgrau iuj progresoj, kiujn Bulgario faris dum la komunisma tempo, kiu post la turka jugo katapultis ĝin al kvazaŭ-moderna ŝtato, Bulgario restis ege malriĉa lando sub la socialismo. Se ĝi estus „dancinta laŭ la fajfilo de kapitalismaj konzernoj", Bulgario hodiaŭ verŝajne troviĝus sur la sama ekonomia nivelo kiel Grekio, Portugalio aŭ Turkio.

La personecon de GD Milovan Đilas, kiu povas esti konsiderata kiel unu el la plej objektivaj observantoj kaj raportantoj pri la historio de la komunisma movado, prijuĝis entute pozitive, ĉar laŭ li GD estis sincera, kuraĝa, modesta kaj bonkora homo. Tiajn tipojn Stalin nepre malŝatis, malfidis kaj timis. Laŭ Đilas GD ne estis la tipa aparatulo, aŭ karieristo, sed li estis verva komunisto, kies personeco efektiviĝis, maturiĝis kaj grandiĝis „per bataloj kaj suferoj". Đilas konsideris lin kiel bulgaron de tiu „plej bona speco", ĉe kiu „ribelemo kaj memkonscio kunfandiĝas en daŭra nedetruebla karaktera trajto". Ĉar GD ŝatis la jugoslavojn kaj precipe Tito-n, la jugoslavoj ŝatis GD-n. Certe, ankaŭ ĉi tiu karakterizo povas respeguli nur la idealan staton de la aferoj. Verŝajne, GD havis ankaŭ kelkajn malfortojn, inter kiuj Đilas, kaj ĉi tie parolas la voĉo de la jugoslavo, menciis lian malkapablon kontraŭstari la por-sovetiajn funkciulojn en la Centra Komitato. Ankaŭ sektemaj tendencoj ne estis fremdaj al li. Finfine, Đilas konsideris sian bulgaran kamaradon nekutime „brava" en la batalo kontraŭ la „klasmalamiko", sed, kiel en la kazoj de aliaj „ortodoksaj" komunistoj, lia problemo estis, ke li kondutis tro „malkuraĝe kaj timeme" rilate al Stalin,[72] kvankam Dedijer havis ĉi-rilate iom alian opinion (vd. sub 9.) kaj atribuis al GD, ke li kontraŭstaris Stalinon, kiu evidente komencis suspekti la mankantan lojalecon de GD, plej malfrue post la rompo de la jugoslavoj kun Stalin, pro kio GD estis forigita de BG kaj anstataŭigita per la Ĉervenkov-bando. Homo, kiu havis la temperamenton kontraŭstari iun Göring kaj iun Goebbels, ne povis perdi la saman temperamenton finfine ankaŭ kontraŭstari iun Stalin. Tio estas mia propra hipotezo, aŭ almenaŭ konkludo, eble konvinko.

Do, pluraj punktoj pri la rolo de GD en la diversaj historiaj eventoj restos malfermaj kaj diskutindaj. Povas esti, ke GD celis la bonon, sed li ne povis eviti kaj devis silente aprobi kaj toleri, ke okazis multe da malbono, en Komintern kaj en Bulgario. Lia aglibereco ŝajne estis limigata, ĉar li plene dependis de Stalin, kiu kapablis kaj sukcesis plene submeti al si la bulgarojn kaj ĉion dikti kaj altrudi al la ili. Sed tio ne farus lin senkulpa. Dum la pli memfieraj jugoslavoj (t.e. serboj, kroatoj, slovenoj) sukcesis emancipiĝi de Stalin, la bulgaroj restis aŭ eĉ decidis resti liaj sklavoj kaj subuloj, same kiel ili

[71] Mi ankaŭ ne scius kun kiuj bulgaraj esperantistoj eblus ankoraŭ reale diskuti pri tiu temaro, ĉar ŝajnas al mi, ke neniu (al mi konata) emas plu paroli pri ĝi. Post la politika turniĝo, en iu Esperanto-kontribuaĵo Aleksiev montris totalan seniluziiĝon pri la burĝa-kapitalisma renverso en sia lando.

[72] Sendube, Đilas troigis sian entuziasmon rilate al la pritakso de similaj komunismaj korifeoj, kvankam ekzemple Tito estis karakterizita de li kiel nekutime aŭtoritatisma potenculo, kiu adoris la lukson kaj abomenis kritikon, pro kio ankaŭ Đilas mem estis sendita de Tito por multaj jaroj en la malliberejon. Vd. en Milovan Đilas: Jahre der Macht. 1992, p. 215s.

estis la sklavoj kaj subuloj de la turkoj kaj same de la reĝimo de Todor Ĵivkov, kvazaŭ tiu ŝafa konduto estas specifeco de la nacia mentaleco aŭ de la nacia konscio de la bulgaroj, kiuj sentis eternan kaj tro hipokritan dankemon al la rusoj, kiuj liberigis ilin de la turkoj kaj de la faŝistoj. GD certe konsciis pri tiu nesolvebla problemo de la dependeco de Stalin, sed por solvi ĝin laŭ la jugoslavia maniero mankis la kondiĉoj, ĝenerale dirite. Kaj GD estis alia tipo ol Tito. Eble oni povas provizore fari la (banalan) konkludon, ke GD fariĝis samtempe viktimo kaj kulpanto de la stalinismo, eble pli viktimo ol kulpanto, ĉar pro sia kulpeco en la komunismaj krimoj li finfine eble eĉ ne kulpis, sed aliaj. Ĉu la historio povos absolvi lin – malfacila demando, ĉar multaj kontraŭdiroj pri la personeco de GD restas konservataj. Kaj al mi estis por tiu ĉi studo, en kiu povis esti traktitaj nur kelkaj elektitaj temoj ĉirkaŭ GD, tro malmulte da materialo je la dispono por fari GD-n pli palpebla kiel homon. Pliaj studoj devos esti farataj kaj aliaj fontoj devas esti konsultataj por povi ankoraŭ pli ekzakte kaj definitive pritaksi la rolon de GD en la komunisma movado, en Sovetunio kaj Bulgario.

## *Prisilentado kaj malhelpoj post la fino de la komunismo.*

Laŭ Fanna Kolarova, la nuntempaj socialistoj en Bulgario, kiuj estas la rektaj posteuloj de la komunistoj, ne estas pretaj akcepti objektivan historian prilaboradon de la historio, ĉar ili devus transpreni la politikan kaj moralan respondecon por la faroj de la komunistoj, kiuj regadis la landon depost la 9a de septembro 1944. En Bulgario do ekzistas nek scienca prilaborado de la komunisma tempo nek ŝtata instanco, kiu dokumentas la krimojn de la bulgara komunismo. La arkivoj de la iama sekreta servo daŭre estas fermataj. Sole oni diskutas ĉu oni publikigu nomojn kaj montru dokumentojn. En Sofio estis starigita memortabulo kun la nomoj de 10’000 murditaj viktimoj de la stalinisma teroro. La starigo de aliaj memorejoj estas planata. Ekzistas leĝo pri rehonorado de viktimoj, de kiuj kelkaj estis rehabilititaj kaj ricevis ridindajn monsumojn. Kolektoj kaj publikigoj estas limigitaj al privataj iniciatoj, kaj la organizaĵoj de la viktimoj dependas de si mem. La esplorado de la amastombejoj, kiuj rilatas al la tempo inter 1944 kaj 1953 estas malhelpata. La parencoj de la viktimoj estas minacataj kaj timas paroli. La serioza “malkomunistigo” de la socio ne okazis en Bulgario. Iuj urboj, stratoj, placoj daŭre portas la nomojn de stalinistoj-komunistoj, kiuj eĉ ricevis monumentojn. La komunistoj en Bulgario faris krimojn kontraŭ la homeco, krimojn kontraŭ la ŝtato kaj falsis la historion. Neniu gardisto, kiu turmentis la malliberulojn en la koncentrejoj de la tempo de GD aŭ poste, estis punita kiel krimulo, ĉar laŭ la leĝo la tempolimo por puni iun ajn kulpanton pasis. En Bulgario ne ekzistas ĝenerala amnezio rilate al la tempo inter 1944 kaj 1989.[73]

Malgraŭ tiu pesimismo, kelkaj gazetoj, kiel Dnevnik, Trud, Monitor, Blitz kaj Pressadaily, kaj multaj privatuloj en la interreto, publikigante interesajn artikolojn kaj materialojn, donas kialon por esperi, ke en Bulgario oni komencis kritike trakti ankaŭ tiklajn historiajn temojn, por heligi la tabuojn, kiuj validis dum longa tempo kaj kiujn certaj politikaj medioj, inkluzive de la (komunismema) Esperanto-movado, daŭre prisilentas. De multaj bulgaroj, ne nur komunistoj, GD estas konsiderata kiel granda kaj grava figuro de la bulgara kaj internacia historio – do forigi kaj elsarki lian nomon el la historiografio certe estus eraro. Sed nur rozkolore kaj senkritike percepti lin estus tro naive. La taŭga kaj utila, ĝusta kaj vera historiografio konsistas el la klopodo kritike kaj kiel eble plej ´objektive´ trakti la historion kaj la figurojn rolintajn en ĝi. Eble la bulgaroj diras, ke kio estas pasinta tio estas pasinta, same kiel siatempe la turka jugo, kiu daŭris 500 jarojn. Tamen, estas grave koni la pasintecon por lerni el la (eraroj de la) historio.

© Andreas Künzli, lic. phil., Berno (Svislando), 2013, publikigita sur www.planlingvoj.ch en novembro 2013.

[73] Pri la aktuala stato de la historia prilaborado kaj la alireblo de tiuj arkivoj en Bulgario mi ne disponas freŝajn informojn. En la gazetaro aperis jenaj interesaj artikoloj, kiuj principe konfirmas la eldirojn de F. Kolarova:
http://www.nzz.ch/aktuell/international/schonung-fuer-exponenten-des-alten-regimes-in-bulgarien-1.10259693 (aprilo 2011)
http://www.nzz.ch/aktuell/feuilleton/uebersicht/verschollen-gesperrt-verdraengt-1.16824896 (majo 2012)
http://www.dw.de/vergangenheitsbew%C3%A4ltigung-findet-nicht-statt/a-16851926?maca=de-newsletter_de_suedostfokus-4930-html-newsletter (oktobro 2013).

Malnovaj bulgaraj monbiletoj el la komunisma tempo kun la bildo de GD.

Eldonoj de la Taglibro de Georgi Dimitrov en la bulgara lingvo

## *Utiligitaj fontoj kaj referencoj:*


Okcidentaj:
- Ruth von Mayenburg: Hotel Lux. C. Bertelsmann, München 1978.
- Hans-Joachim Härtel u. Roland Schönfeld: Bulgarien. Vom Mittelalter bis zur Gegenwart. Verlag F. Pustet Regensburg u. Südosteuropa-Gesellschaft. München 1998.
- Georgi Dimitroff. Tagebücher 1933-1943 (Bd. 1); Kommentare und Materialien zu den Tagebüchern 1933-1943 (Bd. 2). Hrsg. von Bernhard H. Bayerlein u. Wladislaw Hedeler. Aufbau-Verlag. Berlin 2000. (Recenzoj de Reinhard Müller en *Die Zeit* de 2001-01-04, de Wilhelm von Sternburg en *Frankfurter Rundschau* en 2001-02-05, de Christoph Güdel en *Neue Zürcher Zeitung* de 2001-09-06 kaj de Hans Hecker en *Frankfurter Allgemeine Zeitung* de 2001-09-19).
- George Hermann Hodos: Schauprozesse. Stalinistische Säuberungen in Osteuropa 1948-1954. Aufbau TB Verlag. Berlin 2001. En ĝi: Kap. 2: Der Kostow-Prozess in Bulgarien. S. 41-66.
- Ernstgert Kalbe: Streit um Georgi Dimitroff zum Erscheinen der Tagebücher Georgi Dimitroffs. Diskurs. Vorwort von Klaus Kinner. Streitschriften zu Geschichte und Politik des Sozialismus. Heft 8. Leipzig 2001. (Kompare kun lia ideologie konformisma GDR-kontribuaĵo pri GD el la jaro 1982, ĉi tiu studo estas jam pli objektiva, leginda kaj utiligebla).
- Iskra Baeva / Evgenia Kalinova: Bulgarien von Ost nach West. Zeitgeschichte ab 1939. El la bulgara lingvo de Michael Meznik. Wien 2009, S. 14ff.
- Jordan Baev kaj Kostadin Grozev: Bulgarien. En: Łukasz Kamiński, Krzysztof Persak kaj Jens Gieseke: Handbuch der kommunistischen Geheimdienste in Osteuropa 1944-1991. Göttingen 2009. pp. 143-197.
- Fanna Kolarova: Bulgarien – Blick zurück oder die verschwiegene Schuld. Erweiterter Text eines Vortrags, gehalten in der Gedenkbibliothek (Berlin) zu Ehren des Kommunismus / Stalinismus am 5. Oktober 2010.
(http://gedenkbibliothek.de/download/Fanna_Kolarova_Bulgarien_Blick_zurueck_vom_05.10.2010.pdf)
- Dr. Ivan Nikolov (Prezidanto de la Unio de Subpremitoj de la komunisma teroro): Der Kommunismus in Bulgarien und die Folgen. Dokumente des Osteuropa-Zentrums Berlin. (Internet).
- Karl Schlögel: Terror und Traum. Moskau 1937. Ffrt. 2010,
- Wikipedia („Bombenanschlag auf die Kathedrale Sweta Nedelja“):
http://de.wikipedia.org/wiki/Bombenanschlag_auf_die_Kathedrale_Sweta_Nedelja
- Pri la trakto de la Pola Komunisma Partio en 1937:
http://books.google.de/books?id=o__ZIlTDxiQC&pg=PA335&lpg=PA335&dq=Aufl%C3%B6sung+der+Polnischen+Kommunistischen+Partei+1937&source=bl&ots=TZK9AsOeu-&sig=8oXt3SSHB43mLTIidfHoZX4oQ9Q&hl=de&sa=X&ei=gP4oUd6-LIW7hAeJ4ICQDg&ved=0CC4Q6AEwAA#v=onepage&q=Aufl%C3%B6sung%20der%20Polnischen%20Kommunistischen%20Partei%201937&f=false
- http://www.bulgaria1944-1989.eu/media/Bulgarien1944-1989.pdf.
- A Better Tomorrow: The Georgi Dimitrov Mauseoleum, Hope and Disappointment in Bulgaria
http://www.uctv.tv/search-details.aspx?showID=7644

Jugoslaviaj:
- Vladimir Dedijer: Tito. Autorisierte Biographie. Ullstein Berlin 1953.
- Milovan Đilas: Gespräche mit Stalin. Stuttgart 1963.

- Vladimir Dedijer: Stalins verlorene Schlacht. Erinnerungen 1948 bis 1953. Wien 1970.
- Milovan Đilas: Der Krieg der Partisanen. Memoiren 1941-45. Wien-München-Zürich 1977.
- Milovan Đilas: Jahre der Macht. Im jugoslawischen Kräftespiel. Memoiren 1945-1966. München 1992.

Sovet-komunismaj:
- Георги Димитров - Честита Новата 1946-та година:
http://www.youtube.com/watch?v=904wpA1uimI
- Traitscho Kostoff und seine Gruppe. Dietz Verlag. Berlin (-Ost) 1951. (Entenas la akuzon kaj la protokolon de la proceso).
- Stella Blagojewa: Georgi Dimitroff. Kurze Lebensbeschreibung. Übersetzt von Katja Jude-Russionwa. Dietz Verlag. Berlin 1954.
- * Referenco: D. Kossev, Ch. Christov, D. Angelov: Bulgarische Geschichte. Fremdsprachenverlag. Sofia 1963.
- Grosse Persönlichkeiten der bulgarische Geschichte. Sofia-Press 1971.
- Institut für Gescichte der Bulgarischen Kommunistischen Partei beim ZK der BKP: Georgi Dimitroff. Biographischer Abriss. Dietz Verlag. Berlin (-Ost) 1972.
- Georgi Dimitroff. Ausgewählte Werke. Bände 1-3. Sofia-Press 1976. (Enhavas biografian skizon de GD).
- Christo Christow: 1300 Jahre Bulgarien. Sofia-Press 1980.
- Елена Савова: Георги Димитров. Летопис за живота и революционната му дейност. Издателство на Българската академия на науките. София 1982.
- Ernstgert Kalbe: Georgi Dimitroff – konsequenter Internatonalist und Freunde der Sowjetunion. Karl-Marx-Universität Leipzig, 1982. (online: http://www.archiv.uni-leipzig.de/wp-content/uploads/wz-gesellschaft/Gesellschaftswissenschaftliche%20Reihe/optWZ_Ge_%201982_Heft%2002.pdf). (Ĉar ĉi tiu artikolo estas ankoraŭ verkita en la tipa GDR-stilo, ĝi estas apenaŭ utiligebla. Komparu ĉi tiun kontribuaĵon kun la supre indikita studo de Kalbe el la jaro 2001).

Bulgaraj postkomunismaj:
- Георги Димитров. Дневник (9 март 1933 – 6 февруари 1949). Университетско издателство „Св. Климент Охридски“. София 1997. (Kvankam mi komprenas la bulgaran lingvon, pro tempomanko mi ne legis la enkondukan biografion pri GD).
- В деня за почит към жертвите на комунизма: “И никакви съображения за хуманност”.
(En la tago de la omaĝo al la viktimoj de la komunismo: “Kaj neniuj konsideroj pri homeco”, Dnevnik, 1a de februaro 2011:
(http://www.dnevnik.bg/bulgaria/2011/02/01/1035048_v_denia_za_pochit_kum_jertvite_na_komunizma_i_nikakvi;
http://www.dnevnik.bg/bulgaria/2013/02/01/1995113_prochit_na_istoriiata_linchut_narechen_naroden_sud).
- В нощта на пожара Георги Димитров е бил с жена.
In: http://www.trud.bg/Article.asp?ArticleId=640041. (10.8.2005)
- ВЪЛНА НА ТЕРОР в страната, 400 АТЕНТАТА СРЕЩУ ВЛАСТТА:
In: http://www.monitor.bg/article?id=49814. (13.10.2010)

- Историкът Лазар Велев: КГБ убива единствения син на Георги Димитров.
In: http://www.blitz.bg/article/26282. (10.8.2011)
- Павел Писарев: Жени спасяват Димитров на процеса в Лайпциг.
In: http://pressadaily.bg/publication/11036-Павел-Писарев:-Жени-спасяват-Димитров-на-процеса-в-Лайпциг. (9.3.2013)
- http://www.bulblog.com/wp-content/uploads/2012/12/ТАЙНИТЕ-МЕХАНИЗМИ-НА-НАРОДНИЯ-СЪД.pdf kaj http://www.bulblog.com/?p=4679.
- Извършеният от комунистите Геноцид и Холокост над българската нация (1944-1989 г.) (http://www.extremecentrepoint.com/archives/14230)
- Vikipedio, pri la Popolaj Tribunaloj: http://bg.wikipedia.org/wiki/Народен_съд

- http://bg.wikipedia.org/wiki/Народен_съд
- http://archives.bg
- Fotoarĥivo de Todor Slavčev: http://photoarhiv-todorslavchev.com/?p=3806.
- Georgi Dimitrov reference archive 1882-1949:
(http://www.marxists.org/reference/archive/dimitrov/index.htm)
- Parolado de GD okaze de la 5a Kongreso en BKP en 1948:
http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=OPpvLX6ZrPk

En Esperanto:
- Artikoloj pri Georgi Dimitrov kaj Esperanto en *Bulgara Esperantisto* 5/1972, p. 7-9; *Paco* (GDR-eldono) de 1982, p.20-21 kaj *der esperantist* 3-4/1982, p. 56-59.
- Petra Radenkova: Georgo Dimitrov. Konciza biografio. Antaŭparolo kaj traduko de Nikola Aleksiev. Redaktoro: Asen Grigorov. Sofia Pres 1982.
- Georgo Dimitrov. Pri Esperanto-movado kaj pacbatalo. Skizoj kaj rememoroj dediĉe al 100-jara Dimitrov-jubileo. Aŭtoro: Nikola Aleksiev. Redaktoro: D-ro Detlev Blanke (DDR). Bulgara Esperantista Asocio. Centra Estraro. Sofio 1982.
- Skizoj pri la historio de Bulgara Esperanto-movado. BEA Sofio 1982, pp. 98, 102
- Nikola Aleksiev: Je diversaj temoj. Sofio 2002.

© Andreas Künzli, lic. phil., Berno (Svislando), novembro 2013. La epizodo 1 estis prilaborita en septembro 2017.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, 2013-17

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

(Grava atentigo: La aŭtoro pretendas la kopirajton pri ĉi tiu verkaĵo kiel tuto. Ĝi estas utiligebla de triaj uzantoj nur kun eksplicita skriba permeso fare de A. Künzli. Neaŭtorizata uzo estos raportita al Pro Litteris, Zuriko, kies membro la aŭtoro estas.
Ĉi tiu studo prezentas bazajn informojn, kiuj estas se necese modifitaj, aktualigitaj kaj kompletigitaj. Garantio por la ĝusteco kaj kompleteco de la indikoj ne povas esti donita).